

V-19119/17 (1975)
OOMOTO

MONATA ORGANO DE OOMOTO



1955 11-12

17-a Jaro N-ro (185-186) Administracio : Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo

*Abonprezo : ¥ 240 por unu jaro ; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando : Abonebla
ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Rieuwstraat 172, Den Haag, Nederlando.*

Valoro de la Paco

Karaj legantoj de nia revuo estas petataj ne miskompreni ke ni estas subaĉetitaj de la reklam-fako de la Japana Monopola Tabako-Kompanio, se ni pribabilas ĉi tie pri ŝanĝiĝo de l' prezo de cigaredo de ĝi fabrikata. Temas pri unu el la plej altkvalitaj, nomata "Peace" (Paco). Kiam ĝi debutis antaŭ kelkaj jaroj t. e. nelonge post la Dua Mondomilito, kun elegante desegnita skatoleto, ĝi kostis sesdek jenojn por unu skatoleto entenanta dek pecojn. Malgraŭ la kompare tre alta prezo la tiel nomata inteligenta aŭ gvidanta klaso ĝin ŝate fumis ĉu pro ĝia dolĉa parfumo ĉu pro ĝia nomo ĉu eĉ pro ĝia alta prezo mem, kiu ne estas facile pagebla por la ĝenerala publiko.

Post du tri jaroj ĝia prezo malaltiĝis dek jenojn, kaj pasis du tri jaroj kaj depove la prezo malaltiĝis ankoraŭ dek jenojn. En la printempo de 1954 la kompanio plialtigis la prezon je kvin jenoj. Sed jam en la fino de 1955 ekflugas sur stratoj la famo, ke oni la trian fojon malaltigos la prezon.

Ni havas nenian intencon per tio kritiki la kaprican komercopolitikon de la kompanio, aŭ indiki ekonomiajn cirkonstancojn de Japanujo. Ni nur petas ke la legantoj rememoru la nomon de la cigaredo. Nu, ĉu ne estas sentebla ia ironia koincido ĉe la malaltiĝado de l' prezo de "Paco"?

Kiam finiĝis la Dua Mondomilito, la tuta mondo plej alte taksis la Pacon. Ŝajnis, ke ĝi ĝisoste konvinkiĝis ke la plej kara afero en la mondo estas paco, kies valoron povas superi nek tiu de justeco, nek tiu de libereco. Ĉiu kriis por paco, ĉies lipoj arde adoris pacon, kiel sur la lipoj de japanaj inteligentuloj brulis la "Paco". Sed tio ne daŭris longe. Komenciĝis malaltiĝo de l' prezo. Intervenis prefero de "justeco" aŭ de "libereco" al la Paco. Kaj la mondo rapidis eniri en la senfundan abismon de malvarma milito.

Estis en la printempo de 1954 kiam Oomoto Junulara Asocio iniciatis la kolekton de subskriboj kontraŭ H-bombo, tuj post la eksperimento sur Bikini-insularo. La movado rapide disvolviĝis tra la mondo kaj la konscienco de l' homaro altgrade ekflamis por la paco. Tion oni povus

Hidemaru Deguči

Memornoto

— Sinjoro, en la lasta tempo mi ial sentas min treege soleca sen kaŭzo speciala. Pro kio, mi ne scias, sed ĉu vi povas klarigi al mi, kial mi estas tia?

— Amiko, pro tio, ke via spirito nun estas en la periodo de provado. Baldaŭ ŝanĝo okazos al vi en la koro. Sed ĉu la ŝanĝo okazos frue aŭ malfrue, tio dependas en la ĝusta proporcio de la forto de via Dikredo. Kiam ajn vi estas soleca, aŭ malgaja, vi klopodu kiom nur eble alproksimiĝi al Dio preĝante.

— Pro kia peko mi sentas min tiel soleca, sinjoro?

— Nu... Por diri simple, amiko, tio devenas de la peko en la koro, kiun oni faris en la pasinteco. Tial neniam pro tio estu ofendita kontraŭ aliaj, nek fariĝu pesimista. Ĉiam strebu introspektante kaj vipante al vi mem!

— Mi tamen ne memoras ion malbonan, kion mi iam faris en la pasinteco.

— Vi en la nuna fizika korpo ne scias, amiko, ĉar la pasinteco, pri kiu mi nun diras, apartenas ĉefe al la antaŭa vivo.

— Ĉu do al la homoj okazas la re-enkarniĝo, sinjoro?

— Jes, okazas, kvankam ne al ĉiuj...

— Do kiuj reenkarneblas?

— Generale, renaskiĝas tiuj, kiuj havas obsedan malrezignemon pri

kompari kun la plialtiĝo de la prezo je kvin jenoj. La nova "prezo" tamen baldaŭ devis ŝanceliĝi en decembro, 1955, kiam en Lake Success ĉe la kunsido de l' Konsilantaro por Sekureco la veto de Ĉinujo forĉovis la sinproponon de dekok nacioj, kvankam poste dek ses estis enpermesitaj, escepte Japanujon kaj Mongolujon.

Ni tre timas ke eĉ la nuna modesta prezo denove kaj denove malaltiĝos ĝis fine bankrotus la Monopola Kompanio. Estas superflue, se ni komentarias, ke tiu bankroto signifas bankroton de la tuta homaro.

Pardonu, ke ni iom tro metafore babilaĉis. Kompreneble, por ni estas tute egale ĉu la prezo de ia cigaredo plialtiĝas aŭ malpli. Nia elkora deziro estas ke forpasu la malserioza tendenco trakti la pacon sur la lipoj, sed ke la paco estu problemo de sincera koro kaj problemo de vera ago. Valora estas la justeco, valora estas la libereco, sed ĉio devas cedi vojon al la paco, kiam kaj kiom estas necese. *E. Ito*

io ajn sur la tero, kaj kelkaj renaskiĝas laŭ-bezone — laŭ la aranĝo de Dio.

— Ĉu la vivo estas pli senĝena en la spirita mondo, ol en la fizika, sinjoro?

— Tiel same en unu, kiel en la alia. Diferenco nur estas, ke en la spirita mondo, kiuj gajas, tiuj ekstreme gajas, dum kiuj suferas, tiuj ekstreme suferas. Tio devenas de tio, ke la homo sen fizika korpo, estas tiom pli senpere sentema. Kompreneble, ankaŭ la homo en la spirita mondo havas sian korpon, sed eteran aŭ spiritan. Tial la provado en la spirita mondo estas senpera kaj ĝin povas travivi nur tiu, kiu povas elteni akran senton, kaj kiu estas ekstreme solida kaj forta en Dikredo. Aliflanke, la provadon en la fizika mondo oni povas trasperti, sen tre akra-senta sufero pro tio ke oni havas la fraparmilon — fizikan korpon, tiel ke li povas progresi relative facile iom post iom, eĉ se tre malrapide. Tamen, sen firma decido en la koro oni povas eĉ ofte malprogresi.

— Mi de tempo al tempo diras al mi: Mi preferus morti, ol vivi en tia sensenca mondo. Ĉu tia pensmaniero estas nebona, sinjoro?

— Nebona, amiko! La mondo ŝajnas al vi sensenca tial, ke vi ankoraŭ vin ne trovas en Lumo. Sen rekonu la veran Lumon, vi tute ne povas rekonu la vojon, kien vi iru; vi ne povas havi la vivan esperon en la vivo, kaj vi ne povas scii, por kio vi estas naskita sur tiu ĉi tero.

— Ĝuste tiel. Sed ĉu ne, sinjoro, la mondo kaj vivo estas vere sensenca?

— Mi povas simpatii vin en via opinio, amiko. El unu vidpunkto, la mondo kaj vivo estas vere sensenca, sed el alia pli-alta, ĝi estas vere interesa. Vi vin trovas en mallumo nur por atendi tagiĝon. Apenaŭ vi mem progresas en la kor-stato je unu ŝtupo, tiam kontraŭe la ekstera mondo tiom pli ŝajnas al vi sensenca. Tia fenomeno ne estas malbona en si, sed ĝi estas kriza momento por vi: starante en la lumo de tagiĝo, vi ne devas primoki la mallumon. Lasu zorgi mallumon por si, kaj lasu viajn okulojn for de ĝi. Vi eble diros, ke kio estas antaŭ la okuloj venas nature en la vidon, eĉ se vi ne volas. Bone, tio tute ne gravas, nur se vi ne estos rav-distrita de tio malluma, kio venas en la vidon. Ĝuste en tiu momento, tamen, estas la krizo, pri kiu mi jam menciis, ke unuflanke, vi pli kaj pli foriĝas de mallumo kaj aliflanke, vi ankoraŭ tamen vin alkroĉas, malrezigneme aŭ eĉ ravite, al la mallumo. Kaj ĝuste en tia momento, oni trovas *sin nekomprenebla*. Sed se oni deziras kaj decidiĝas unu fojon por ĉiam eliri el mallumo, oni devas ĉiel forviŝi al si ĉiujn elementojn de mallumo.

En la vera Dikredo kaj en la vera kompreno pri la vivo povas ekzisti

nenia aflikto.

Oni timas mallumon; oni deziras eliri el mallumo kiel eble plej frue; tamen oni ankoraŭ retenas al si la viv-manierojn, per kiuj oni amas mallumon, flatas al mallumo; tial oni afliktas sin, oni sentas sin soleca. Mankas plia pacienco kaj strebado.

El unu starpunkto oni vidas la mondon kaj vivon soleca kaj sensenca. Sed kiam oni rigardas ĝin de sur pli-alta starpunkto, ĝi estas tiel ĉarmoplena kaj facila. Amiko, rigardu ĉiujn, kiel ili baraktas laŭ sia naturo strebante laŭ sia plej granda eblo!

— Mi ne sentus min soleca, sinjoro, se ĉio irus laŭ mia deziro.

— Kiom vi povas, vi agu laŭ via deziro. Kial ne?

— Jes, tamen okazas diversaj kaj multaj malhelpaĵoj...

— Eĉ se ne ĉio glate iras laŭ via deziro pro kaŭzoj nevideblaj kaj nekoneblaj de vi, estas necese, ke vi konstante klopodu kaj strebu al tio, kion vi celas, — pacience kaj kun la torĉo de espero antaŭ vi. Neniam en tia okazo estu pesimisto, aŭ malespera sorto-rompanto; alie, jam ekfrontanta al la helo de tagiĝo, vi refalos en la abismon de mallumo. Estu pacienca en ĉio. Marŝu al via celo paŝon post paŝo, iom post iom. Vivu ĝue ĉiun tagon, ĉiun horon kun trankvilo en la koro, tamen strebante kun atentemo.

Oni povas egale ĝui la kvar sezonojn alterne: printempon, someron, aŭtunon kaj vintron. Ne deziru ĝui ĉiam nur printempon, ne plendu pri somero kaj vintro...

Oni devas ĉiel rimedi al si, kuraĝigi sin, por ke oni ĝuu la vivon.

La insektoj kantas en profunda valo, oazo ekzistas en senlime dezerta loko. Nenie ekzistas la absoluta ĉielregno, nek la absoluta infero en la mondo!

Per ŝanĝo de korteniĝo, ĉiu povos fari iom post iom sian medion ĉielregna, kiel ajn ĝi nun estas mizera kaj soleca laŭaspekte. Tio ĉi estas la plej proksima rimedo, kiu estas la plej grava, kaj ĝin oni ofte ignoras ĵetante la okulojn nur al Alta Idealo.

En la moderna edukado oni instruas tion kaj alion bonegan en la lumo de Idealo, tamen ignorante la altan valoron de malgrandaj vivspertoj en la realo. Tial kiuj estas edukitaj en altaj lernejoj, al tiuj ne mankas memfiero kaj superflua diskutemo. Ne ignoru la paŝojn sub la piedo!

Fine, amiko, la mondo estas "hardejo por la homaj spiritoj". Kial do ĝi povus esti plena de ĉio, kio estas nur agrabla?

— Bona leciono por mi, sinjoro, ha, ha, ha... verdire, okazas, ke mi sentas min tiel malgranda kaj malforta.

— Tre bone, amiko, de tio oni faras la unuan paŝon de la vera vivo!

Japana Kulturo

Artoj en Edo Epoko (II)

Sango Uno

Kiel jam menciite, en Genroku Erao (1688-1704), la meza periodo de Edo Epoko, la ĉiuflanka kulturo plene maturiĝis kaj floris en pompa, multkolora eleganteco. Kiel *ukijo-e* jam prosperiĝis, tiel ankaŭ literaturo faris sian grandan progreson. En la lasta ĉapitro mi menciis pri la literaturaĵo de Saikaku Ihara kaj M. Ĉikamacu. Mi do ne povas preterlasi tiun de Baŝo Macuo, la patro de hajko (1644-1694).

La malnov-skola utao ankoraŭ ĝisvivis en Edo Epoko, kaj nur malmultaj estis eminentaj poetoj. Sed aliflanke, kiu plej karakterizis la versaĵojn de tiu ĉi periodo estis ne utao, sed la versformo nomita *haikai*. *Haikai* estas modifita formo de *renga** kiu akiris grandan popularecon en Muromaĉi Epoko. Ĝi konsistas el du *partoj* — la unua parto el deksep (5,7,5) silaboj kaj la lasta parto el dekkvar (7,7) silaboj. La unua parto estis farata de unu el la ĉeestantoj de poezikunveno kaj la alia parto — aldonata de alia por sukcese elfari unuopan poemon. Ĉi tiu nova formo de versfarado igis nenecesa respekti la rigoran regulon de klasika poezio, tiel ke simplaj urbanoj povis facile partopreni en tia versfarado. Baŝo altigis tiun ĉi formon ĝis la digneco de beletristiko. Estis ankaŭ en tiu ĉi

tempo ke la "unua parto" de *haikai* sendependiĝis kaj fariĝis memstara nur kun 17 silaboj, kaj nomiĝis *hokku* aŭ hajko (kiu vorto estas enkondukita en P.V.).

Estas nature ke hajko, la plej mallonga (5,7,5 silaboj) el ĉiuj poeziaj formoj, postulas al si tiom ekstreman simpligon de esprimo, kiom oni nur kapablas. La enhavo de hajko do devas esti strikte streĉa kaj kompakta en la ekstrema grado de la principo de "neceso kaj sufiĉo".

La mondo de hajko estas de tre rafinita gusto. Ĝia esenco ne devas esti morala, nek simple humora, sed devas esti tia, per kiu la aŭtoro patose tuŝas la homan koron dank' al sia profundigo en la naturo kaj sia humorsento altigita ĝis bel-literaturo. Kaj ankoraŭ ĝi devas esti komune komprenebla por ĉiuj pro simpatio eterna. Ni povus diri, ke hajko estas la plej supera en belliteraturo en la senco ke ĝi esprimas riĉan enhavon en plej mallonga formo, unika poezi-formo en la mondo.

Baŝo Macuo vojaĝis tra la nord-orientaj provincoj de la lando, kiam li estis 42-jara, kaj priskribis sian vojaĝon en volumo de libro sub la

* *renga* : Vidu n-ran 7-8 de OOMOTO, 1954.


titolo "Oku-no-Hosomiçi" (Malvasta Vojeto en Foraj Provincoj), kiu ankoraŭ nun havas amason da legantoj. Kelkajn jarojn antaŭ ĉi tiu vojaĝo li versis la jenan haĵkon:

Malnova laget' —
ensaltis ran' subita,
son' tra la kviet'!*

Estas dirite ke per tiu ĉi poemeto Baŝo starigis al si la belan monumenton senkomparan kun la verkoj de siaj antaŭuloj. Hajko ĉi tie fine akiris sian propran literaturan vivon, fariĝinte jam libera de la epigrama karaktero de la *haikai*.

En tiu ĉi periodo ĉiuj kulturoj maturiĝis en bela kontaktiĝo unu kun aliaj, sekve ankaŭ en la pentra kaj ceramika kampoj aperis virtuozaĵoj, kiuj elfaris gravajn kultur-trezorojn.

Speciale menciinda estas la ekzisto de pentristo-fratoj, Koorin Ogata (1658-1716) kaj Kenzan Ogata (1663-1743). Oni povas diri senhezite ke Koorin atingis la plej altan pinton en la ortodoksa art-historio



de l' japana pentraĵo. Li verŝajne komprenis ĉiujn pasintajn tendencojn kaj gravajn elementojn de la japana pentro-arto kaj tiuj harmonie kunordiĝis per lia art-tekniko, kiu mirinde akordas kun la enhavo — tiom perfekte, libere, senmanke — kiom neniuj similaĵoj estas alie troveblaj. Estas do nature, ke el la freŝaj elementoj de lia tekniko disfloris sekvantaj novaj skoloj.

Oni ofte inklinas tro alte taksi la artojn de Momojama Epoko pro ilia ekstera pompeco je la risko de la perfektigita beleco en la artoj de Genroku Erao. Tamen, mi mem volas taksi la duan pli alta.

La 1-a kaj 2-a bildoj montras la pentraĵojn, kiujn Koorin verkis. Mi bedaŭras ke la kliŝoj estas ne bonaj; cetere, per unu aŭ du ekzemploj oni neniel povas penetri en la fundon de la artista animo. Ĉiu el liaj



elementoj. Kaj la pentraĵoj sur la ceramikaĵoj portas la kvietan etoson de Zen-ismo, kaj en tiu punkto eĉ superas tiujn de Koorin, lia pli-aĝa frato.

La 3-a bildo montras la surpentritan tetason de Kenzan, kiun oni eltrovis lastatempe. La realeca, aŭ eĉ super-realeca bela komponado de la krizantemo pentrita kontraŭ la akvo estas senkompare admirinda! Oni devas bone noti la fakton, ke tia majstra verkaĵo ne povas naskiĝi escepte de la fekunda grundo de la ĝenerala kulturo, alta kaj profunda, kiun jam entenis la Tokugaŭa epoko!

La 4-a bildo montras unu el la sam-epokaj ceramikaĵoj de Kutani-skolo, kiu skolo ankoraŭ nun postrestas en Kutani (en Iŝikaŭa



verkaĵoj estas tiel perfekta kaj egalece bonkvalita el la arta vidpunkto — kvazaŭ pura oro, kies ero estas oro ĝisfine! Lia eksterordinara talento, manifestita en la teknika perfekteco pri komponado, kolorado kaj realisma desegno tute ne estas klarigebla per mial malriĉaj vortoj.

Se mi metafore diras, ke la genia talento de Koorin kiel pentro-artisto estas oro, tiu de Kenzan kiel ceramikisto, lia malpli-aĝa frato, povas esti arĝento en la senco, ke ambaŭ estas unikaj en siaj art-sferoj. La ceramikaĵoj de Kenzan reprezentas la kvietan kaj profundan tonon, kaj la rafinitan guston de la aŭtoro. Ili estas tute japanecaj, t.e. ne influitaj de fremdlandaj



* En trad. de T. Mikami

Prefektujo). La pentraĵo sur la ceramikaĵo meritas nian apartan miregon. La bildo de ŝipo pentrita en solida maniero sur la granda plado, kies diametro estas ĉ. 40 c.m., donas al ni la impreson, ke ĝi estas komun-elementa kun la supre montrita bildo de Kenzan.

Oni ĝenerale rigardas en tia-specaj pentraĵoj sur ceramikaĵoj nur "desegnojn" malgraŭ tio ke ĝuste tiuj estas sendependaj "artaĵoj". Oni devas noti ke ili tute ne estas profesie faritaj "skizoj" de metiistoj, sed estas belartaĵoj, super kiuj strebis la aŭtoroj kiel pentristoj. Pri tio iom kulpas eŭropanoj kiam ili kontaktas kun la japanaj ceramikaĵoj, vidante nur "skizojn", aŭ "desegnojn", aŭ simple "ornamaĵojn" en la pentraĵoj. Tia vid-maniero estas tiel erara, kiel se oni — en la mala okazo — kvalifikas belartaĵo ĉiun bildon, kiu ajn estas pentrita en kakemono, aŭ sur *fusuma** kaj



bjoobu (faldebla ekrano).

La 5-a bildo montras la poton, kiun bakis la famekonata ceramikisto Kakiemon Sakaida (1596-1666) en Hizen (la nuna Saga Prefektujo en Kjuŝu). La tuto estas japanstila kaj donas al ni la *puran* senton; la simileco estas ne trovebla inter la ceramikaĵoj de la Ming dinastio de Ĉinujo. La karakteriza trajto de la Kakiemon-ceramikaĵoj estas en ilia ruĝa glazuro. Kiel Kakiemon penis kaj dediĉis sian vivon por elfari la "ruĝon" jam estas populare konate al japanoj aŭ per teatraĵo, aŭ per japana ceramika historio. De la antikva tempo la arto de glazuro estas la viv-longa temo de ĉiuj grandaj ceramikistoj, kaj ĝi estas tiel malfacila, ke ĉe ni restas multaj rakontoj pri la iniciatintoj de la esotera arto. La penego de Kakiemon estas unu el tiuj — eble, plej konata. Liaj ceramikaĵoj estas transportitaj en Eŭropon kaj stimulis ne-mal multe la progreson en la arto de la okcidenta ceramiko; ili kaŭzis la sinsekvantan naskiĝon de imitaĵoj kaj similaĵoj. Konsidere la ceramikan arton, la orientanoj, precipe japanoj povas havi iom da fiero kaj la devon plue evoluigi la arton.

Ĉe la fino mi rimarkigas ke la spirito de la japana klasika ceramiko (supre montrita) ĝenerale estas identa kun la poezia spirito de hajko, ekz. de Baŝo.

Trad. La Red.

* *fusuma*: Vidu n-ro 3-4 de OOMOTO, 1955.

Vojaĝo de Angla S-anino D. M. Worcester en Japanujo



Sino D. M. Worcester en sia provizora loĝ-ĉambro ĉe Oomoto Virina Domo, Kameoka.

La 22-an de okt. la angla s-anino D. M. Worcester alvenis al la haveno de Kobe kaj tie stampis sian unuan paŝon en Japanujo por sia vojaĝo per Esp. En Japanujo ŝi vivis ĉie kun gastamaj samideanoj dum 2 monatoj ĝis ŝi forlasis la landon ĉe la haven-urbo de Otaru la 26-an de dec.



La 22-an de okt. laŭ la komuniko de Kobe-ano, nia redakciano, s-ro Esumi, rapidveturis al Kobe por

Ekskursi aventuro per barko laŭ la rapidafluo de la rivero Hozu; du-hora ekstaza veturado de Kameoka ĝis Araŝijama. La 7-an de nov. s-ini Worcester en akompano de kelkaj samideanoj amuzis sin per kelkloke danĝere-ekscita malsuprenveturado. La supra foto montras: s-ro Esumi, redakciano (maldekstre), s-ini W. (meze) kaj s-ro Kojima el Osaka (dekstre). (Foto de s-ano Matano)

salutakcepti la gaston. Tie ĉeestis ankaŭ d-ro H. Jagi, kiu interkonatiĝis kun s-ini Worcester dum la Univ. Kongreso en Haarlem, kaj petis al s-ro Esumi, ke Oomoto aranĝu ŝian vojaĝ-programon en Kansai Distrikto (Kioto-Nara-Osaka-Kobe). La propono estis akceptita kaj s-ini Worcester gastiĝis ĉe Oomoto-centro, Kameoka, en la daŭro de du semajnoj de la 24-a ĝis la 7-a de nov. Du ĉambroj de Oomoto-Virina Domo, ĵus elkonstruita en japana stilo, estis por ŝia dispono dum ŝia tuta



restado. Intertempe, laŭ la gvido de Oomotanaj Esp-istoj, lokaj Esp-istoj en Kioto, Nara, Osaka kaj Ocu ĉi partoprenis ne nur bonvenigajn kunvenojn de Esp-istaj grupoj, sed ankaŭ ne-Esp-istajn kunvenojn en la nomitaj urboj. Ĝi ĉiam volonte akceptis intervjuon kun iu ajn. Eĉ dum veturado en vagono aŭ tramo ofte kolektiĝis ĉirkaŭ ĉi gajaj kaj bonhumoraj junaj studentoj por sin ekzerci kun



ĉi en la anglalingva konversacio. En tiaj okazoj ĉi neniam forgesis propagandi al ili la lingvon Esp.

Unu modesta Londona Esp-istino, s-ino Worcester multe kontribuis por interkompreniĝo de ambaŭ popoloj japana kaj angla, kaj por propagando de Esp. en Japanujo per multaj publikaj paroladoj kaj ĉiutaga praktiko de Esp. Ĝi ja laboris aktive, senlace kaj ĉiam gaje, kaj la ĝenerala efiko estis tiel bona ke la samideanoj en Osaka kaj Kobe estis devigataj denove inviti ĉin al

←*Torii* (ruĝ-kolora pordego) de Heianjingu-Sanktejo en Kioto. La Sanktejo estas dediĉita al la animo de la imperiestro *Kammu*, la fondinto de la urbo, kaj de la imperiestro *Komei*, konstruita en 1895 okaze de la 1100-jara datreveno de la establiĝo de *Heian-Kjo* aŭ la "Kortega Urbo de Paco", t.e. la nuna Kioto. La interna korto de la Sanktejo estas admirinda pro la belegaj ĝardenoj. (Foto de s-ro Takeŝi Oda)

←*Kinkaku* Pavilono (La Ora Domo) en Kioto. La Domo estas konstruita de *Joŝimicu Aŝikaga*, la tria ŝoguno de la Aŝikaga-dinastio, en 1397. Sed la nuna domo estas ĵus rekonstruita — post forbruliĝo antaŭ kelkaj jaroj — laŭ modelo de la originalo, kiu prezentis la guston de antikvaj nobeloj kaj bonzoj de la budaisma Zen-sekto. (Foto de s-ro T. Oda)

←Malsovaĝaj cervoj en la Nara Parko, Nara. Ĉ. 400 cervoj vagas du-kaj triope kaj kolektiĝas ĉirkaŭ vizitantoj por "peti kukon". La tuta areo de la parko, kiu inkluzivas la arbaron de Monto Kasuga, Monton Mikasa kaj la belan deklivon de Monto Ŭakakusa (malantaŭe vidata en la foto), kovras 1250 akrojn. En Nara ni vidas multajn malnovajn templojn. (Foto de s-ro T. Oda)

Nara-no-Daibucu (La Grandioza Buda — statuo de Nara), la plej granda bronzstatuo en la mondo. Kun la intenco krei la simbolon de Budaisma paradizo sur la tero, la imperiestro *Ŝōmu* konstruigis la templon kun ĉi tiu statuo antaŭ ĉ. 1200 jaroj. La mezuro de la statuo estas: alteco: 53 ft. 5 in.; larĝeco de okulo: 3 ft. 11 in.; longo de dikfingro: 4 ft. 5 in.; de vizaĝo: 16 ft.; de orelo: 8 ft. 6 in.; pezo: 500 tunoj!

si unu semajnon (13-19, nov.) okaze de ĉia veturo al Nagoja post la gastigo en Okajama kaj Hiroŝima (la okcidenta parto de la lando).

Ni nun havas sufiĉe multajn raportojn pri la postsignoj de ĉia vojaĝo, kiuj ĉiuj meritis la publikigon. Ni tamen tre bedaŭras ke la raportoj estas tro ampleksaj por ke OOMOTO publikigu ilin. Ni do anstataŭigas ilin per nur kelkaj fotobildoj de la vidindaĵoj en Kansai Distrikto, kiujn ĉi vizitis kaj admiris pro ilia japana beleco. El turisma vidpunkto, Kansai Distrikto estas la plej grava regiono en la lando, ĉar ĉiuj esencoj de la antikvaj japanaj kulturoj troviĝas ĉi tie.

Ĉe la fino ni ne forgesu menci i ke ĉia vojaĝo donis al ni japanoj valoran lecionon, kiamaniere ni kontaktiĝu kun ne-Esp-ista publiko pere de alilanda s-ano, kiu malofte venas al Japanujo. Ĉi-foje ĉi laboris




interalie en kooperativa movado, virinaj asocioj, altlernejoj ktp. Ĉi tie ni esprimas nian koran dankon al s-ino Worcester pro ĉia vizito kaj samideana laboro. Samtempe ni dankas al s-roj S. Koĵima (en Osaka) kaj J. Nakai (en Nagoja), kiuj bonvolis sendi al ni la raportojn pri ĉia vojaĝo, kaj pardonpetas, ke ni ne povis publikigi ilin. *La Red.*

La 19-an de nov. ĉe la stacidomo de Nagoja s-ino Worcester estis akceptata de kelkaj membroj de Nagoja Esp-Societo kaj Nagoja Filio de UHA. Inter bonvenigantoj troviĝis la franca s-ano Salmo, SAT-ano, kiu alvenis al Nagoja pli frue ol ĉi survoje al sia hejmlando, Francujo. S-ino ←W. dum ripozeto en la ĉambro de la staciestro intervjuis kun lokaj ĵurnalistoj. La foto montras ges-anojn Worcester kaj Salmo en la ĉambro de la staciestro. Malantaŭ ĉi vidiĝas la flageto de UHA. La foto estas prunte-donita de Asahi-ĵurnalejo.

Porpaca Movadoj

Dua Kunsido de Reprezentantoj de Japanaj Mondanigitaj Urboj

Kiel oni legis en la lasta n-ro de OOMOTO, en Japanujo nun sukcese iras la Mondaniĝo de Urboj unu post alia. Por akceli la pluan progreson, la Dua Kunsido por Interkontaktiĝo de Japanaj Mondanigitaj Urboj (KIJMU) okazis la 16-an de nov., 1955, ĉe la urboficejo en Macue (la japana Venecio). Partoprenis ĉ. 30 personoj inkluzive la urbestrojn kaj prezidantojn de la urbo-deputitaroj de la mondanigitaj urboj, Macue, Hirata, Jasuki, Ajabe, Kameoka, Hiroŝima, Kiŝimoto, kaj



La reprezentantoj de la japanaj mondanigitaj urboj dum la dua konferenco en Macue

ankaŭ de la mondanigota Jamaguĉi. Ĉeestis ankaŭ la ĝenerala sekretario de UHA kaj delegito de Unuiĝo por Mondfederacia Registaro (el Tokio).

Antaŭ la interkonsiliĝo s-ro Kumano, urbestro de Macue, faris la jenan saluton:

“La homoj vivis kaj vivas per amo. Eĉ se la homa kunvivado estiĝas laŭ la natura leĝo, se la homoj ne kunligiĝos per amo, ilin tuj superregos perforto kaj batalo. Jam en nia generacio ni havis du grandajn mondmilitojn, kaj la dua finiĝis per la tragediaj okazaĵoj en Hiroŝima kaj Nagasaki. La unuanima voĉo de ‘Ne plu Aliaj Hiroŝimaĵoj’ pli kaj pli altiĝis tra la mondo. Tamen, nek el la grava konferenco de la Kvar Ĉefoj en Ĝenevo, nek el la Unuiĝintaj Nacioj, ni povis ricevi la konkludon por nuligi la militon.

Cetere, malgraŭ la minacanta mond-situacio, ke la nukleaj armiloj povas damaĝi ne nur la atakitojn sed ankaŭ la atakintojn ankoraŭ nun sporade daŭras lokaj konfliktoj en Proksima Oriento kaj Sud-orienta Azio. Eĉ el tio sola estas

konstateble, ke la mondon savos nenio alia ol la ideo de Mondfederacio, sin bazanta sur Amo.”

Post la raportado de s-ro M. Ohaŝi, delegito de Unuiĝo por Mondfederacia Registaro pri lastatempaj informoj el la mondo, kaj la prezento de mesaĝoj, oni interkonsiliĝis pri la jenaj 5 problemoj:

- 1) Kiamaniere akceli la mondanigon de

komunumoj en Japanujo (prezentita de UHA);

- 2) Interŝanĝo de la kulturoj inter la Mondanigitaj Urboj de la mondo (prez. de la sama supre);

- 3) Kiamaniere klopodi por vaste diskonigi la celon kaj signifon de tiu ĉi movado de la Mondanigo (prez. de Macue-urbo);

- 4) Pri la organizo de KIJMU (prez. de la sama supre);

- 5) Pri la venonta tria Kunsido.

Ĉar la 1-a kaj 2-a problemoj havas en si komunecon, oni diskutis samtempe pri ambaŭ. Interalie interesa estis la plano por establi la film-fakon, kies fakuloj rondvojaĝos tra la mondo por filme propagandi la ideon de Mondfederacio. Kvankam ĝi estis aprobita de la Unuiĝo por Mondfederacia Registaro, tamen ĝia efektivigo ankoraŭ apartenas al la estonteco.

Pri la 2-a problemo, ĉiuj ĉeestintaj urb-reprezentantoj promesis sian kunhelpon por la interŝanĝo de infanaj verkaĵoj inter la mondanigitaj urboj de la mondo. La planon faris UHA okaze de sia 30-jara jubileo. (vidu n-ran 5-6 de OOMOTO, 1955).

Pri la 4-a, oni proponis starigi la konstantan sekretariejon, sed oni konsentis daŭrigi la nunan sistemon, t. e. laŭvica aranĝado de l' membroj-komunumoj.

La Tria Kunsido okazos en

Hiroŝima (provizore decidita).

Post la kunsido ĉiuj partoprenintoj vizitis la vidindaĵojn de la urbo, favorate de la bela aŭtuna vetero.

— Red.

Mondaniĝa Deklaro de Du Japanaj Vilaĝoj

En Nov. 1955 la jenaj du vilaĝoj en Japanujo sinsekve proklamis la Mondaniĝan Deklaron. Bonvolemaj samcelanoj estas petataj sendi gratul-kaj kuraĝigleterojn al la vilaĝestroj!

DAISEN-MURA (Saihaku-gun, Tottori Prefektujo): “Kun la arda deziro por la eterna paco, nia vilaĝo Daisen, kiu havas la profundan rilaton kun la origino de l' prahistoria japana kulturo, kaj kiu situas en la Daisen Nacia Parko, konfirmas la celadon de la Movado por Mondfederacio, kaj deklaras ke ĝi strebos kunlabori por la bonfarto de la tuta homaro. (La 1-an de Nov., 1955)”

JAMABE-MURA (Sorachi-gun, Hokkaido): La vilaĝo Jamabe decidis deklari sin ‘Mond-vilaĝo’, tiel ke ni subtenas kunlabore kun la popolo de l' mondo la Movadon por Mondfederacio, kiu celas progresigi la bonon de la tuta homaro.

Jamabe-mura konfirmas sin kiel la eterne pacan vilaĝon en la Mondkomunumo. (La 10-an de Nov., 1955)”

Japanujo nun havas 12 mondanigitajn komunumojn.

— Red.

Sep Japanaj Gvidantoj Kune Sendis Apelacion Al UNO

Arde dezirante "konservi la mondpacon kaj elimini el la mondo tiranecon kaj sklavecon, premegon kaj maltoleremon", sep japanaj gvidantoj sendis apelacion al UNO, ĉefoj de la ŝtatoj kaj ĉefaj prirespondaj mond-organizacioj la 11-an de nov., 1955. En la apelacio ili deklaris:

1. Membrigu nemembro-ŝtatojn al UNO;
2. Kunvoku en sept., 1956, konferencon por rekonsideri la Ĉarton de UNO kaj fari ĝin konferenco por prove verki la Mondfederacian Konstitucion;
3. Kunvoku en sept., 1957, la Unuan Mondpopolan Kongreson samtempe kun la Ĝenerala Kongreso de UNO.

La alvokon oni preparis jam en sept. 1955, konsiderante pri la kreskanta minaco de nukleaj armiloj kaj pri la ĉiu-ŝtata eksterlanda politiko, kiu mankas je la "sincera strebado al paco".

La subskribintoj en la alvoko havas nenian rektan rilaton kun politikaj aferoj, ili estas liberalistoj apartenantaj al la demokratia tendaro de la mondo kaj tamen havas la influpovon en sia sfero, kaj faris la unuan paŝon por mondskala movado.

Ili estas: s-ro Jasaburo Ŝimonaka, ĉefdirektoro de Unuiĝo por Mond-

federacia Registaro; s-ro Tamon Maeda, prez. de Japana Nacia Komitato por Unesko-komisionano; d-ro Seiĝi Kaja, prez. de Japana Akademio de Sciencoj; d-ro Hideki Jukaŝa, prez. de Instituto de Fundamenta Fiziko; s-ino Raiĉo Hiracuka, prez. de Japana Federacio de Virinaj Organizacioj; s-ino Tamaki Uemura, prez. de Japana Unuiĝo por YWCA kaj s-ino Tano Ĵodai, prez. de Japana Sekcio de Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libero.

— Red.

Konferenco por Akceli la Rezonon pri Milito

La Konferenco okazis la 26-an de nov., 1955, ĉe la Unua Domo por Parlamentanoj sub la aranĝo de Unuiĝo por Mondfederacia Registaro. Ĝin partoprenis ĉ. 200 personoj, ĉefe parlamentanoj, reprezentantoj kaj delegitoj de diversaj organizacioj, kiel virinaj, religiaj, laboristaj kaj aliaj. El UHA ĉeestis s-roj Kurokaŝa kaj Mimura. Post la vigla diskutado pri la akcelo al la rezigno pri milito, oni decidis la jenan deklaron:

En la nuna momento, kiam aperis hidrogenbomboj,

1. Milito estu ĉesigita ĉiamaniere;
2. Ĉiuj nacioj pace kunekzistu unu kun la aliaj kaj ĉiuj internaciaj konfliktoj estu solvitaj jam ne per militforto, sed per paca negoco.

La tuta afero jam estas komune aprobita de la tutmonda popolo. La milit-rezigno, kies oficialan deklaron ni, japanoj, aŭdace faris per la Konstitucio antaŭ 10 jaroj, nun

montras la vojon irotan de la mondo. Tamen, malvarma milito, ekde la finiĝo de la lasta milito, ankoraŭ trenas tra la mondo sian nigran ombbron: potencaj ŝtatoj, sur-buŝe elokventaj pri paco, aktuale tamen ne ĉesigas sian armadon, kaj tial aliaj ŝtatoj estas devigataj oferi sian forton al la grandigo de militforto anstataŭ al la prosperigo de ekonomio kaj socia bonfarto.

Kvankam la popolo estas pacama, nia amata Japanlando reiras la vojon al rearmado, pli kaj pli ampleksigante la militbazojn, pli kaj pli kompletigante la memdefendan armeon kaj tiel reorganizante la landon en la sklavecon de altrudita armita ŝtato. Ĉi tio estas por ni ja granda embaraso — neniel tolerebla.

Por malhelpi tian reakcion enlande, kaj firme starigi la efektive pacan landon, kian celas la Japana Konstitucio, kaj ekstere puŝi la mondon en novan pacan ordon, ni ĉiuj devas forte kunlabori kun la popolo tra la mondo. Hodiaŭ ni kolektiĝis por manpremi al ni reciproke kaj pliprofundigi nian amikecon kaj solidarecon, kaj ĵuras fari nian laŭebleman klopodon. Kaj fine, ni faras la jenan alvokon al la popolo de la mondo:

1. Rezigni pri milito laŭ la modelo de Japanlando;
2. Senprokraste aboli A- kaj H-bombojn kaj komenci la konkretan aranĝon pri la abolo de ĉiuspecaj armiloj.

— Red.

Popola Arto pri Pupoj

(14) Vulpo-Pupo

(Argilaĵ-pupo en Imado)


Zen'ichi Ŝuĉi

La argil-pupoj bakitaj ĉe Imado en Tokio iam estis tiel famaj kiel tiuj ĉe Fuŝimi en Kioto. Tamen, ambaŭ famoj malkreskis nuntempe.

Oni diras ke Imado, iama najbara vilaĝo de Edo (nuna Tokio), vigle produktis diversajn argilaĵojn: pupoj, mebloj kaj aliaj, laŭ la plifirmiĝo de la Ŝoguna Registaro en Edo kaj la prosperiĝo de la urbo. La vulpo-pupo estis uzata kiel oferaĵo al Inari Temploj laŭ la tradicia popolkredo. Antikvaj japanoj adoris vulpojn kiel servantojn al Inari-dio pro la kredo ke ĉi tiuj havas okultan povon. Ĉi moro estis populara en la Edo Epoko kaj postrestas

ankoraŭ nun parte en la lando.

La grandeco kaj formo de la vulpo-pupo estas diversa. La montrita pupo 10 c.m. alta estas de ordinara tipo.





Literatura Rubriko

★ SVEDA POEMARO, en traduko de Magda Carlsson. Eldonis *Eldona Societo Esperanto*, Stockholm, 1954; 112 p. (12 × 18 cm); Prezo, 9 ŝ. 6 p.

Kolekto da 72 esp-igitaj poemoj de 31 svedaj poetoj plus du pecoj el la Biblio. Ili plejparte estas liriko en religia tono, kelkaj estas himnaj, eĉ evangeliaj, aliaj tre pensigaj pri la vivo. Carlsson antaŭparolas, "la leganto nur en kelkaj kaŝoj, sed ne ĝenerale povas fari konkludojn pri la literatura signifo de la diversaj aŭtoroj laŭ la nombro de iliaj poemoj en ĉi tiu libro. Multaj meritplenaj verkistoj ne estas reprezentitaj, dum enestas kelkaj poemoj de malpli konataj. La elekton de tradukotaj poemoj mi ne faris laŭ ia plano, sed pro inspira amo kaj intereso al la koncerna poemo en aktuala horo."

La tradukita poemaro, kiun Carlsson elfaris "ĉizante" unu post unu kun amo kaj pio — eble en la daŭro de multaj jaroj liveras al ni oazon de trankvilo meze de nia tro proza ĉiutaga vivo. Eĉ pro tiu ĉi sola kaŭzo la poemaro meritas la legon de ĉiuj poemamantoj. Kaj aparte el la lingva vidpunkto, unu granda merito de Carlsson estas ke ŝi ne uzante superfluaĵajn novajn vortojn sukcesis interpreti la svedan poezion en tiel klara kaj eleganta formo de Esp. Laŭ ŝi (sur p. 112), ŝi uzis nur tri novajn vortojn: *bestio* (sovaĝbesto), *sinuo* (serpentumado, kurbzigzagaro), *tragika* (tragedieca). Do minimumo da bezono por tia ampleksa traduko. (Oni

notu, ke *tragika* estas Oficiala kaj trovebla en P.V.!)

Krom multaj pecoj min aparte interesis *Marista Lulkanto* laŭ la sprita enhavo kaj malpeza ritmo. Legante *Nia Sorto* de Bo Bergman, mi rememoris malnovan hajkon; la komparo eble interesos la legantojn.

Ni flagras cente —
sekfoliaro
pelita vente —
al nia celo,
al tombobaro.
En ruĝfabelo
ni vivas reve;
moviĝas deve,
traflugas meve
la maronokton,
kun vent' batalas.
Levitaj vente
ni ree falas
kaj eksilente
eniras nokton.

Jen la hajko:

Elmontre falas
unu flankon l' alian
acerfolio!

La libro — papero, preso, bindo — estas plaĉe belgusta. Mankas nenio, krom la portreto de la tradukinto.

T. Mikami

★ LA NICA LITERATURA REVUO, N-ro 1, 40-paĝa dumonata revuo; Prezo, jare fr. fr. 400, aŭ egalvaloro; abonebla ĉe ĉiuj delegitoj kaj landaj perantoj de U. E. A.

Tre alt-grada literatura gazeto sub la ĉefredaktoreco de G. Waringhien, kun la Redakta Komitato konsistanta el R. Bernard, R. Pérez, T. Pump, R. Rcssetti, I. Rotkviĉ, R. Schwartz. La novnaskita n-ro enhavas 10 poemojn kaj 12 prozaĵojn de 14 laŭ-nome famaj esp-istoj inkluzive K. Kalocsay. Nur la prestekniko kaj litertipoj lasas ion por deziri, por ke la aspekto ankaŭ konvenu al la riĉa enhavo. Ni deziras sanan kaj longan vivon de tiu ĉi altranga revuo kun multaj abonantoj kaj subtenantoj.

M.

★ GAUCHE LA ĈELISTO, scenario por kolorfilmo de pup-teatro; produktita de Mitui Arto-Produkcio el la originalo de Kenji Mijazaŭa; trad. de Jasutaro Nojima; eld. de Japana Esperanta Librokooperativo (Nakacu-hamadoori 2-20, Ojodo-ku, Osaka, Japanujo); formato: 13 × 18 cm.; 41 paĝoj; prezo: 4 resp. kup.

La rakonto temas pri Gauche (elparolu Gooŝ), bonkora sed ne-lerta violonĉelisto de kamparana orkestro, kiu fine gajnas por la orkestro publikan aplaŭdon pro sia subita admirinda lud-tekniko, kiun li akiris dank' al la simpatia helpo de liaj kolegoj-animaloj: leporo, talpo, strigo, kato, kukolo, sciuro-patrino, sciuro-infano, muso-patrino, muso-infano, melido kaj paseroj.

Hazarde samtempe, la rakonto en alies traduko aperis serie en La Revuo Orienta, 1955, kiel la plej bona tradukaĵo en Literatura Konkursio. Komparante ambaŭ la recenzanto havis impreson ke la nuna estas speciale adaptita por lud-presentado kaj en tio ĝi sukcesas. La rolantoj, nove adaptitaj por pup-teatro kaj muziko aplikita laŭ la Pastoralo de Beethoven (kies sukcesa publika prezento estis la ĉefa celo de la

orkestro en la rakonto) sukcese efikas al la ĝenerala interesigo de tiu ĉi naiva sed ĉarma drameto. Ankaŭ la enmetitaj 3 fotobildoj el la pupteatra filmo ekscitos la scivolemon de legantoj pri la samtema kolorfilmo en kvin bobenoj (kiu estas havebla ĉe la eldonejo supramenciita, sed la prezo ne estas indikita). Eĉ kiel memstaran legaĵon mi rekomendas la broŝuron ne nur al geknaboj, sed ankaŭ al plenaĝuloj.

N. E.

★ LA TEKSTO DUA, kompilita de la Redakcio de *La Movado*, organo de Kansai Ligo de Esp-istaj Grupoj en Osaka; eld. de Japana Esperanta Librokooperativo kiel Malgranda Biblioteko 6; formato: 10.5 × 15 cm.; 30 paĝoj; prezo: ¥30.

Kiel la titolo montras la broŝureto estas teksto por la duagrada kursanoj de nia lingvo Esp. Male al la unuavide mizera, malgranda aspekto, la enhavo estas riĉa je interesaj materialoj diversspecaj: interparolo, humoraĵoj, leteroj, fabeloj, anekdotoj, poemoj, japanaj hajkoj kaj utaoj, kaj ĉe la fino la famekonata "Knabineto kun Alumetoj" de Andersen. Bona, konforma legaĵo por freŝbakitaj Esp-istoj. Mi senhezite rekomendas ĉi tiun malkaran broŝureton kun neniu misproso al ĉiuj mezgradaĵ kursanoj.

N. E.

★ La FIANĈINO DE OILVETAN, en La Ponto, organo de Franca sekcio de Kristana Esp-ista Ligo Internacia, 2, Av. Debidour-Paris (19e); jan, '55; 10 p, stencilpresita en la leter-formato. Temas pri la neplenumita amo de la fianĉino de Oilvetan, alnomo de Petro Robert, tradukinto de la Biblio en francan lingvon. Unuakta teatraĵo en bona traduko.

U.N.E.S.C.O. NOVAĴOJ

Protekto de la Kulturaĵoj Valoroj en Okazo de Armita Konflikto

La Internacia Konvencio por la Protekto de la Kultura Proprieto en Okazo de Armita Konflikto estas jam ratifita de Egiptujo. Estas interese rimarkigi, ke Egiptujo kun siaj riĉaj kulturaj kaj artaj trezoroj estis la unua lando, kiu ratifis la Konvencion.

La Konvencion akceptis interŝtata konferenco en Hago, kunvokita de U.N.E.S.C.O., la 14-an de Majo 1954. La signo, sub kiu estos protektataj la kulturaj kaj artaj valoroj, estas flago kun blua kaj blanka kampoj. Ĉiuj monumentoj, havantaj tiun signon, estos protektataj simile kiel la "ruĝa kruco" protektas hospitalojn, ambulancojn, medicinan personaron dum la milito. La Konvencio ankaŭ antaŭvidas, ke ĉe U.N.E.S.C.O. estos formita speciala registro pri monumentoj, kiuj ĝuos eksterordinaran protekton en okazo de milito. La Konvencio ricevos juran forton, kiam ĝin ratifos kvin ŝtatoj.

Eŭropa Premio por Literaturo

La Eŭropa asocio de libro-societoj kaj kluboj, sub la aŭspicioj de la Eŭropa Kultura Centro, donos la 15-an de junio 1956 en Ĝenevo gravan literaturan premion por romano aŭ biografio, ĝis nun ne publikigita, havanta altan literaturan nivelon kaj kun tia karaktero, ke ĝi pravigas la tradukon en plurajn lingvojn. La premio estas 10.000 svisaj frankoj. La verko povas esti skribita en kiu ajn lingvo. La manuskripto devas havi inter 200 kaj 400 paĝoj kun

interspaco. La prijuĝa komitato konsistas el Jean Giono, Ignazio Silone, Stephen Spender, Frank Thiess, H. Dressler, Denis de Rougemont. Pliajn detalojn oni povas ricevi de: Centre Européen de la Culture, Villa Moynier, 122, Rue de Lausanne, Genève, Svislando.

Internacia Ekspozicio de Poŝtmarkoj en Prago

Ĉirkaŭ tridek ŝtatoj partoprenis en la ekspozicio de poŝtmarkoj, kiu okazis en Prago (Ĉ.S.R.) dum la 10-25 de Septembro. La kolektoj inkluzivis unu liveritan de la plej nova poŝta administracio en la mondo, nome tiu de UNUIĜINTAJ NACIOJ. Okaze de la ekspozicio, la ĉeĥoslovaka poŝta administracio eldonis serion de 5 poŝtmarkoj kun diversaj valoroj. La poŝtmarkoj prezentas ekzemplojn de pluraj arkitektaj stiloj. (*Laŭ UNESCO Features*)

Nove eldonitaj anglalingvaj broŝuroj:

THE OOMOTO MOVEMENT

Its Origin and Objects

(kun multaj fotobildoj)

51 p. en formato: 12×18cm.

Prezo: 1ŝ.6p. aŭ \$ 0.21

THE BASIC TEACHINGS OF OOMOTO

61 p. en formato: 12×20 cm.

Prezo: 1ŝ.8p. aŭ \$ 0.24

Mendu ĉe:

Librofako de OOMOTO

Kameoka, Kioto-hu, Japan

Parolas la Legantaro

★ S-ro Dirk M. Brink, San Diego, Usono

Kiel ĉiam mi kun ĝojo ricevis vian gazeton kaj leginte vian artikolon, mi nun pli bone komprenas vian sintenon kontraŭ la "maloldiga" tendenco de kelkaj en nia lingvo. Kvankam mi ne estas obstina fundamentisto en la senco, ke mi malaprobas la enkondukon de novaj vortoj kaj esprimoj en nian lingvon, MI KONTRAŬSTARAS ĈIUN KLO-PONDON aldoni novajn vortojn apud la jam ekzistantaj vortoj, kun la sama signifo. Bedaŭrinde la aldono de la P. V. estas plenplena je tiaj vortoj, kiuj nur malfaciligas kaj malsimpligas la lernadon de Esperanto, eĉ ridindigas nian aserton ke en nia lingvo estas nur unu vorto por unu ideo. Sen la uzo de la novaj vortoj KIAM AJN, ni POVIS, POVAS kaj POVOS ĉiam esprimi nin klare kaj kompreneble. Fuŝadon ni evitu! Sed la antaŭeniranta evoluo de scienco necesigas novajn vortojn kaj esprimojn, nepre ankaŭ ni senhezite enkonduku tiajn vortojn kaj esprimojn por resti ĝisdata kaj moderna, sed ne plu. Ni ne volas rebabeligi la mondon; ni konservu la donacon de Zamenhof.

Nun pri alia afero. Espereble via gazeto kuraĝas presigi la jenajn parolojn. La atombombo estas terura armilo, sed ni ne forgesu, ke sen ĝi miloj da militkaptitoj (ankaŭ mi) ne plu vivus. Oni (la Japana registaro) dum la milito DAŬRE minacis mortigi la militkaptitaron, se iu fremda malamiko metus paŝon sur japanan teron. Pro tio la ununura solvo estis: la atombombo. En

la militkaptitejo Nakama, kie mi estis, oni jam havis pretaj 12 barelegojn, plenplenajn je metilalkoholo, por vive nin forbruli. Ankaŭ la forbruligejo estis preta, la enirejo kaj elirejo garditaj de maŝinpafillegoj.....

Sufiĉas paroli pri tio. Ankaŭ ni suferegis, oni fortranĉis langojn de niaj soldatoj; ekzerce uzis virojn kaj eĉ gravedajn virinojn por bajoneti ĝismorte, sen ia kaŭzo; fortranĉis seksorganojn de militkaptitoj ktp. Viajn atombombviktimojn mi kompatas, sed mi ne forgesas niajn proprajn viktimojn..... La Germanoj havas proverbon: *Die Mörder sind unter uns*, en Esperanto: *La murdistoj estas inter ni*. Alivorte: ne kulpigu aliuojn se la kulpo estas ĉe vi mem.

Ankaŭ pri tiu afero sufiĉe. Mi estas idealisto, kaj mi certe laboregos por mondpaco. La vivo sur tiu ĉi planedo estas nur relative mallonga. Pro kio mizerigi tiun vivon per torturaĵoj, malamikaĵoj kaj militoj? AMO estas la sola solvo. Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali por reunuigi la homaron! Zamenhof donis al ni la ilon, Ni devas ŝanĝi nian animstaton!

La lasta afero, kiun mi volas diskuti, estas preskaŭ la sama kiel la unua: Sur danĝera vojo. Bedaŭrinde ekzistas inter la samideanaro personoj, kiuj treege ŝatas sian nomon. Ili elspezas la lastan moneron por vidi sian nomon sur libreto, libro, flugfolio aŭ io tia. Ili FUŜE tradukas, FUŜE diskutas, kaj FUŜE eldonigas FUŜAĴOJN. Ili mordas kiel musoj al nia lingvo por "plibonigi" kaj "plifaciligi" ĝin. Unuel tiuj fuŝaĵoj estas de s-ro—. Mi sendos ĝin al vi per marpoŝto.

Poŝtmarka Informo en 1955 (IV)

Haruja Maekaua

4) 10, Sept. — 5-ena ordinara poŝtmarko.

Koloroj: malhele blua kaj bruna.

Preso: fotografura.

Formato: $22.5 \times 18 \frac{7}{8}$ mm.

Aranĝo de folio: 10×10 (100).

Eldon-nombro:

(I-a) 7,000,000.



La poŝtmarko montras paron da *Ošidori* (*Aix galericulata*), kaj el japanaj ordinara poŝtmarkoj estas la unua, kiu estas dukolora en fotografura preso.

5) 30, Sept. — 2-specaj poŝtmarkoj de Rikučuu-kaigan (marborda) Nacia Parko, kiu etendiĝas 90 kilometrojn longe kun la ĉefa karakterizo kiel liaso laŭ la pacifika marbordo de Iŭate Prefektujo (nordorienta provinco de la lando).


Valoroj: 5 enoj kaj 10 enoj. Koloroj: malhele verda kaj malhele ruĝa.

purpura. Preso: fotografura. Formato: $40 \times 22.5 \frac{7}{8}$ mm. kaj $22.5 \times 40 \frac{7}{8}$ mm.

Aranĝoj de folioj: 5×4 (20) kaj 4×5 (20).

Eldon-nombro: po 4,000,000.

La 5-ena poŝtmarko montras Bentenzakabon, kiun oni vidis de Kitajamazaki-kabo, kaj la 10-ena montras Joodogahama-marbor-



Popola Arto pri Pupoj


(15) Bovo-Pupo

(Argilaĵ-pupo de Bizen)

Zen'ichi Ŝuĉi

En la orienta parto de Okajama Prefektujo estas Takura-no-Uŝi* Sanktejo, kies dio estas laŭdire tre bonfara al la malsanoj de homoj, bovoj kaj ĉevaloj.

En la antikva tempo ĝi estis nur



montara vilaĝ-sanktejo, tamen la famo pri la mirinda bonfaro tiel disvastiĝis ke hodiaŭ kelkdek miloj da personoj vizitas la sanktejon en ĝia plej granda festotago, la 5-a de jan. La sanktejo havas nek templon, nek preĝĉambron; sidas plenaere nur la kuŝanta ŝton-bovo 60 c.m. alta kiel idolo. En la ejo, kie oni metas oferaĵojn, troviĝas kelkdek miloj da bov-argilaĵoj bakitaj en Bizen-skolo, el kiuj preĝanto kun ia peto rajtas forpreni unu ĉe sia vizito kaj devas redoni kun la aldon de nova ekzemplero kiel dankesprimon okaze de la sukcesa plenumiĝo de sia peto. La moro kun ŝamanisma ombro originis en la tre malnova tempo. La pupo estas ŝatata ankaŭ por hejma ornamaĵo.

* "Uŝi" signifas bovon.

don. La 17-an de okt. oni eldonis 216,300 ekzemplerojn de ĝia speciala folio kun la kovrilo, sur kiu oni vidas la bildon de Senjoojiki[mil-tatama]-ŝtonego troviĝanta en la Parko, kaj en ĝia dorsflanko oni vidas la klarigon pri la Parko en la lingvoj japana kaj angla.

6) 3^a, Okt. — Memorigaj poŝtmarkoj por la 10-a Nacia Atletika Kunveno, kiu okazis de la 30-a de okt. ĝis la 3-a de nov. en 46 sportejoj en Kanagaŭa Prefektujo kun partopreno de pli ol 14,000 geĉampionoj el la tuta lando.



Valoro: 5 enoj. Koloroj: grize blua kaj malhele ruĝa. Preso: gravura.

Formato: $27 \times 22.5 \frac{7}{8}$ mm. Aranĝo de folio: flanko ĉe flanko (*se tenant*) 5×4 (20).

Eldon-nombro: po 3,000,000.

El la poŝtmarkoj unu montras 20-kilometran vetkuron, kaj la alia virinan amasgimnastikon.

7) 1, Nov. — Speciala poŝtmarko por Filatela Semajno de 1955.

Valoro: 10 enoj. Koloroj: malbrile ruĝa, malbrile verda, malhele flav-bruna kaj nigra. Preso: fotografura. Formato: $48 \times 33 \frac{7}{8}$ mm. Aranĝo de folio: 2×5 (10). Eldon-nombro: (I-a) 5,000,000; (II-a) 500,000.

La poŝtmarko montras la bildon de "Virino blovanta vitran ludilon" kiun pentris Utamaro Kitagaŭa, la fama pentristo de belulinoj en Edo Epoko. (vidu p. 101 de OOMOTO, 1955.)




8) 20, Dec. — Novjara poŝtmarko por 1956.

Valoro: 5 enoj.

Koloroj: Olive verda kaj ruĝe oranĝa. Preso: fotografura.

Aranĝo de folio: 5×4 (20). Eldon-nombro: 6,000,000.



La poŝtmarko montras lokajn pupojn de "Kokeŝi" kaj "Eĉiko", kiuj estas karakterizaj produktaĵoj de la nordorientaj provincoj.

R 3) 26, Nov. — Memoriga poŝtmarko por 350-jara datreveno de la plantado de enportitaj batatoj.



Valoro: 4 enoj.

Koloro: bluverda. Preso: fotografura. Formato: $27 \times 22.5 \frac{7}{8}$ mm. Aranĝo de folio: 5×10 (50). Eldon-nombro: 200,000.

La poŝtmarko montras la sanktejon, kie estas apoteozita la spirito de Sokan Noguni, enveniginto de batato-plantidoj de Fukjen-ŝeng (Ĉinio) al Rjukju-Insularo.

Sooseki Nacume (1867–1916)

Mi estas Kato

Mi estas Kato. Mia nomo ankoraŭ mankas.

Kie mi naskiĝis, la tut' estas en nebulo. Mi ankoraŭ memoras nur, ke mi estis blekanta miaŭ-miaŭ — en loko duonhela kaj neseka. Tie por la unua fojo mi vidis la estaĵon, Homo. Tiu ĉi apartenis, kiel mi aŭdis poste, al la plej ŝakala raso el ĉiuj Homaj: nome, la lernoservantoj. Tiu ĉi lernoservanta raso, oni diras, de tempo al tempo nin kaptas, kuiras, formanĝas! Sed tio ne kaŭzis al mi apartan teruron, ĉar tiutempe mi ankoraŭ ne kapablis pripensi ion. Nur strangan ŝveban sensacion mi spertis en mi sur la manplato de la lernoservanto, kiam li min levis fff-t en la aeron. Post ioma kvietigo sur la manplato, mi direktis mian rigardon al la vizaĝo de la lernoservanto, kio certe fariĝis por mi la unua-foja observo pri Homo. Kurioza! la impresoj tiumomenta ankoraŭ restas ĝis hodiaŭ. Unue, la vizaĝo, kiu devas esti garnita per haroj, estas kalve-glita kvazaŭ terpota flanko. Deformiton tian mi neniam vidis inter la Katoj, kiujn mi renkontis de tiam en sufiĉa nombro. Plie, la vizaĝo estas tro elstara en la centro. Kaj el la truoj de la elstarajo foj-foje elfumas puf-puf. Ĝi sufoke ĝenegis min! Ke tio estas nomata tabako, kiun Homoj kutimas fumi, mi eksciis nur en la lasta tempo.

Dum momentoj mi komforte sidis sur la mano de la lernoservanto. Baldaŭ mi min trovis en subita movado kun eksterordinara rapido. Ĉu la lernoservanto movadas, aŭ mi mem sola, ĉiukaze miaj okuloj al mi terure turniĝis. Mi sentis vomemon. Morto! mi eksentis, kiam ĵetbruis dung! kaj briloj ekfulmis el miaj pupiloj! Jen ĉio, kion mi memoras, kaj kio sekvis, tion mi neniel povas rememori, kion ajn mi elcerbumas.

Kiam mi rekonsciigis, la lernoservanto jam ne troviĝis. El miaj fratoj, da kiuj mi havis multe, neniuj jam troviĝis. Eĉ mia plej kara Panjo estis malaperinta. Cetere, malsame ol la antaŭa, ĉi tiu loko estas tiel lumplena, ke mi preskaŭ ne povas teni miajn okulojn malfermitaj. Kio okazis? En tute stranga cirkonstanco mi troviĝas! Tiel pensante mi komencis treni min per malrapidaj paŝoj, dum mi tre sentis akran doloron. Mi jam rekonis, ke mi estas forĵetita de la pajlolo sur bambufoliaran kampon!

Kun granda penado mi apenaŭ elrampis el la bambufoliara kampo, tiam mi trovis antaŭ mi grandan lageton. Sidante antaŭ la lageton mi komencis cerbumi: Kion fari? Neniu bona ideo venis al mi en la cerbon. Post kelkaj momentoj mi ekpensis, ke eble la lernoservanto revenos por mi, se mi blekos. Mi provis per miaŭ-miaŭ, sed venis al mi neniuj. Baldaŭ la venteto susuris trans la lageton kaj la suno kliniĝis por vesperkrepusko. Mi tre malsatas. Jam la voĉo ne elgorgas eĉ por plori. Senhelpe! Mi decidis paŝi ĝis loko, kie estas io ajn manĝebla, kaj malrapidante iris laŭ la lageton maldekstren. Al mi estis tre

suferige. Tion mi apenaŭ eltenis per mia tuta forto trenante min ĝis mi atingis la lokon, kie mi ekflaris la homodoron. Mi eniru, kaj eble estos helpo — mi en la korton de fremda domo enŝoviĝis tra fendo de rompita bambubarilo. Ligo estas io mistera: se ĉi tiu bambubarilo ne estus difektita, eventuale estus povinta okazi, ke mi malsatmortis survoje. "Sub la ombro de arbo estas ŝirmejo" — bone dirite! La fendo de ĉi tiu bambubarilo ankoraŭ hodiaŭ servas kiel pasejo por mi kiam mi iras vizite al F-ino Trikolora de mia najbara domo. Nu, enirinte en la korton, mi tamen ne sciis kion fari por mia orientado. Dume, venis la mallumo. Malsato minacas. Terure malvarmas. Ekpluvas kaj tiel plu, ke eĉ momenton mi plu ne povas preterlasi pro hezito. Senkonsile mi paŝis direkte al loko luma kaj varma. Laŭ mia nuna konstato pri la tiam, mi estis jam enirinta en la internon de la domo. Tie mi havis la ŝancon revidi Homon alian, ol la lernoservanto. Kiun mi renkontis unue, estis servinjo. Ĉi tiu estas pli sovaĝa, ol la lernoservanto. Apenaŭ ŝi ekvidis min, ŝi min kaptis ĉe la nuko, forĵetis sur straton. Hej, ne bone prosperas al mi la afero; mi fermis la okulojn lasante mian sorton al Providenco. Tamen, la malsaton kaj malvarmon mi jam ne povas elteni. Tial mi rampis sur la kuirejon dum la servinjo malatentis. Post momento mi min trovis elĵetita. Kaj mi enrampis kaj mi elĵetiĝis, kaj la sama afero ripetigis, se mi bone memoras, kvar- aŭ kvin-foje. Ja estas en tiu momento, ke la estaĵo, servinjo, fariĝis por mi ĝisoste abomena! Antaŭ nelonge mi repagis, forŝtelinte la fiŝon de ŝia plado, tiel ke mi fine povis al mi rekvietigi la agititan galon. Kiam lasta-foje mi estis pinĉ-elportota de ŝi, tiam la Mastro de la domo elvenis kriante, "Kio okazis kun tia bruo?" La servinjo tenis min penda kaj montrante min al la Mastro, akuzis, "Sinjoro, ĉi tiu senhejma katido ĉiam revenas al la kuirejo, kiam ajn ofte mi pelas-pelas, kaj ĝenegas min!" La Mastro kelkan tempon rigardis al mi en la vizaĝon, fingre tordante al si la nigrajn harojn sub la nazo, kaj baldaŭ deklaris, "Do lasu ĝin ĉe ni!" kaj malaperis internen. Ŝajnis, ke la Mastro estas vortoŝpara persono. La servinjo kun bedaŭro-venĝa mieno ĵetlasis min sur la plankon de la kuirejo. Jen kial mi decidis, ke mi faru ĉi tiun domon mia loĝejo.

Mia Mastro kaj mi tre malofte renkontas vizaĝ-fronte unu la alian. Lia profesio estas instruisto, mi aŭdis. Kiam li revenas de la lernejo li enfermas sin en la studĉambron por la tuta posta tago kaj jam preskaŭ ne elvenas intertempe. Ĉiuj domanoj pensas, ke li estas granda studanto. Ankaŭ li ŝajnigas sin studanto. Tamen, fakte li ne estas tiel granda studemulo, kiel la domanoj diras. Foje okazas ke mi ŝteliras, spionas en lian studĉambron, kaj ofte trovas lin tagdormanta, kelkafoje li salivetas sur lian libron malfermitan. Li havas dispepsion. Lia malelasta haŭto en pal-flava nuanco montras la simptomojn de apatio. Malgraŭ tio, li estas manĝeganto. Post kiam li manĝegis supersate li trinkas dozon da *Takadiastase*. Post kiam li ĝin trinkis, li malfermas libron. Post du-tri paĝoj li jam iĝas dormema. Li salivetas sur la libron. Tio ĉi estas la tagordo, kiun li ripetas en ĉiu vespero. Malgraŭ la Kato, mi de tempo al tempo filozofas: la sorto de instruisto estas tiel facila; se oni naskiĝas kiel Homo, plej bone fariĝi instruisto; se oni dormante povas plenumi sian oficon, kial ne la Kato? Kaj tamen en la opinio de mia Mastro, esti la instruisto estas plej mizere. Li ĉiam grumbblas pri io kaj ĉio, kiam ajn liaj amikoj venas.

En la tempo, kiam mi ekloĝis en ĉi tiu domo, ĉiuj al mi estis malsimpatiaj, krom la Mastro. Al kiu ajn mi min turnu, ĉiu forpuŝis min, neniu pariĝemis kun mi. Kiel malkare mi estis traktata, oni povas facile vidi el la sola fakto, ke mia nomo ankoraŭ mankas! Tial, kun rezignacio mi kutimas kiom eble apudesti ĉe mia Mastro, kiu afable allasis min en la domon. Kiam matene mia Mastro legas ĵurnalon, mi saltas sur lian genuon. Kiam li tagdormas, mi saltas sur lian ŝultron. Tio ĉi ne ekzakte signifas, ke mi ŝatas mian Mastron, sed estas la plej lasta rimedo kontraŭ la tedo, ke neniu amikas al mi. Post mia travivo de diversaj okazoj mi nun kutimas kuŝi, matene, sur la varma rizujo; vespere, sur la lit-varmigilo kaj tage dormi sur la verando, se la vetero estas bona. Sed la plej granda komforto estas, en ĉiu nokto, enŝoviĝi en la liton de la infanoj de ĉi tiu familio kaj kune dormi. Ĉi tiuj infanoj — unu estas kvin-jara kaj la alia tri-jara — eniras en unu saman liton por dormi okupante tutan ĉambron. Mi ĉiam serĉas inter ili la malplenan spacon, kie mi povas min enmeti iamaniere. Tamen, malbonŝance, se unu el la infanoj foje vekiĝas, tiam nepre sekvas katastrofo! La infanoj — precipe la malpligranda estas pli malica — ploreksplodas kriante en granda voĉo, "Kato venis! Kato venis!" tute indifere, ĉu tio estas dum nokto aŭ ne. Ĉe tio mia nervoz-dispepsia Mastro ĉiam vekiĝas kaj elkuras el alia ĉambro. Jen vidu, antaŭ nelonge okazis, ke mi estis forte batita sur mian postajon per mezuril-stangeto!

Ju pli mi observas Homojn loĝante kun ili, des pli konvinkite mi jam ne povas ne aserti, ke ili estas kapricaj. Precipe la infanoj, kun kiuj mi ofte kunlitas, estas ekstravagance-impertinentaj. Se nur al ili okaze plaĉas, ili pendigas min transkapiĝe, aŭ kovras al mi la tutan kapon per sako, aŭ lud-jetas min, aŭ perfortas enŝtopi min en kuirfornon. Kaj se okazus, ke mi reziste ataketas de mia flanko, jam la tuta familio trupe min ĉasas kaj persekutas. Antaŭ kelka tempo, kiam iomete mi provadis per miaj ungoj akriĝante ilin kontraŭ tatamo, la Sinjorino treege koleris kaj de tiam ne facile allasas min en la gasteĉambron. Eĉ se mi estas tremeganta pro malvarmo sur la lignoplanko de la kuirejo, oni tute ne priatentas. Mia estimata S-ino Blanka, kiu loĝas oblikve kontraŭ mia domo, ĉiam diras, kiam mi renkontiĝas kun ŝi, ke neniu estas tiel senhomeca kiel Homo! Al ŝi naskiĝis antaŭ nelonge kvar pup-ĉarmaj idoj. Kaj kio okazis? Ŝi diris al mi, ke la lernoservanto de ŝia domo jam la trian tagon forprenis ilin kvar, entute forĵetis en la lageton post la domo kaj revenis kun malplenaj manoj. Elversante la larmojn, S-ino Blanka rakontis al mi tion en la plej etaj detaloj kaj ĝentile aldonis, "Por ke nia Kat-gento povu ĝui la belan pacan famili-vivon en plena ligo de patro-fila amo, ni nepre devas iam batali kontraŭ Homoj kaj ekstermi ilin!" Vorton post vorto ŝi pravis — mi opinias. Aliparte, F-ino Trikolora de mia najbara domo treege indignas, ke Homoj posedrajton tute ne komprenas, kia ĝi estas. Inter niaj samgentanoj estas nature, ke kiu trovis unua ion — ĉu kapon de sekigita sardino, ĉu pecon de mugelo — tiu plene rajtas ĝin preni. Se iu alia malobeus ĉi tiun regulon, oni rajtus procedi eĉ per fizika forto. Tia koncepto kredeble forestas el la kapo de Homoj, tiel ke ili ĉiam arogas forrabi al ni la frandaĵon, kiun ni eltrovis por ni. Kalkulante je sia propra fortego ili rabas al ni kion ni juste rajtas manĝi, kaj restas tute senskrupulaj. S-ino Blanka estas ĉe la

domo de soldato. F-ino Trikolora havas advokatan ĉikanulon kiel la mastron. Mi loĝas en la domo de instruisto. Tial se temas pri tia-speca afero, mi povas esti pli optimisma, ol ili. Se tagon post tago mi povas vivteni de mano al buŝo, mi jam estas kontenta. Arogantaj estu Homoj; ne ĉiam tamen prosperos al ili la afero. Pli bone, ni atendu pacience la Tempon de Katoj!

Parolante pri kaprico, mi rememoris kiom mia Mastro fiaskis pro ĝi. Mi rakontos tian al vi. Denature, mia Mastro pli talentas ol aliaj en nenio aparte, kaj tamen li emas enŝovi la manon en ĉion ajn. Li verkas hajkojn, kontribuas tiujn al la *Hototogisu*, publikigas nov-stilajn poemojn en la *Mjojo*, skribas eraroplenan anglalingvan artikolon, foje absorbiĝas en pafarkado, lernas utajon¹, ankaŭ skrapas la violonon brrr-brrr — sed oni kompatu lin, en ĉio senescepte li estas tia fuŝulo! Kaj tamen, kaj malgraŭ dispepsio, li supermezure entuziasmiĝas kiam li komencas ion. Eĉ en la fekejo li kutimas tiel recitadi la utajon, ke la najbaroj alnomas lin Fekeja Moŝto, dum li tute indifereblas. Kiel ĉiam li recitas, "*De l' Taira-klano mi estas Munemori...*" Kaj ĉiuj ekridas unu la alian, "Jen li havas *Munemori*!" Al tiu ĉi Mastro mi ne scias kia vento ekblovis en la cerbon, sed ĉirkaŭ unu monaton post kiam mi ekloĝis en ĉi tiu domo — la salajrotagon de iu monato li rapidis hejmen kun granda pakaĵo en la mano. Kion li aĉetis? Akvarel-farbojn, penikojn kaj paperojn markitajn *Watman's* mi trovis. Mi divenis, ke li jam ĉesos la hajkverkadon kaj utaj-recitadon, sed nun okupiĝos en pentrado! Kaj mi trafis, ĉar de la sekvanta tago daŭre por kelka tempo, eĉ maldormante tage li nur pentradas tagon post tago en sia studĉambro! Sed vidu kion li ellaboris, kaj neniu povos juĝi eĉ kion ĝi reprezentas! Ŝajnas, ke sian talenton li ankaŭ mem ne tre alte-taksas, ĉar unu tagon kiam lin vizitis lia amiko, kiu okupiĝas en io nomita "estetiko", mi aŭdis lin diri la sekvantan aferon.

"La pentradon mi trovas vere malfacila", eldiras la impreson mia Mastro. "Ŝajnas tiel facila, se mi vidas alies labor-pecon, sed kiam mi prenas penikon en la mano, la afero estas alia; mi sentas ĝin subite malfacila". Vere, lia konfeso estas sincera, al mi ŝajnas! "Ja neniu povas bone pentri en la komenco", admonas la amiko rigardante mian Mastron trans siaj orkadraj okulvitroj. "Unue memoru, ke sidante en la ĉambro kaj nur el imagaĵoj oni ne povas fari bonan pentraĵon. Antaŭ longa tempo la Itala virtuozo Andreo del Salto diris: Se iu volas pentri ion, skizu ĝin laŭ la naturo. En la firmamento brilas steloj; sur la tero estas rospartaj floroj; flugas birdoj, kuras bestoj; en lageto naĝas orfiŝoj, kaj sur velkintaj branĉoj ripozas korvoj. Naturo formas per si grandan pentraĵon! Kial do vi ne komencu skizon laŭ naturo, se vi volas ellabori ion pentroartan?"

"He? Ĉu Andreo del Salto diris tion!? Mi tut-ne sciis tion! Prave kaj trafe dirite!" mia Mastro superŝutas lin per la vortoj de admiro. De malantaŭ la orkadraj okulvitroj elrigardis mokema rikano.

La sekvintan tagon, kiam mi estis sur la verando tagdormante en komforto kiel kutime, mia Mastro malofte estis ekster la studĉambro kaj — malantaŭ mi — absorbita laborante super io. Mi ekvekiĝis, malfermetis la okulojn je dekona colo, kaj rigardis kion li faras. Li nun prezentas sinforgese la rolon de Andreo del Salto! Vidante ĉi tion, mi ne povis deteni mian rideton. El la blago de lia amiko rezultis ke li nun faras min la objekto de sia unua pentrado! Mi jam estas sufiĉe

dorminta. Mi nun volas oscedi nereteneble. Sed ĉar mia Mastro tiel entuziasme skizas min per peniko, se mi moviĝos, mi certe damaĝigos lin, tial mi paciencis kaj eltenis senmove. Li jam farbis la konturojn de mia figuro kaj estis koloriganta sur la loko de mia vizaĝo. Mi konfesu! Kiel Kato, pli-ol-nivele bela mi tute ne estas kreita. Aŭ laŭ la staturo, aŭ laŭ la hararo, aŭ laŭ la vizaĝ-strukturo, mi tute ne kuraĝas memfidi, ke mi estas pli supera ol aliaj Katoj. Nu, kiel ajn malbela aspektas mia vizaĝo, mi tamen neniel povas imagi min laŭ tia kurioza trajto, kian mia Mastro nun rivelas min pentrante! Unue, la koloro estas alia. Simile al la Kato de Persa deveno, mi havas la lanon, kies koloro estas helgriza en blonda nuanco kaj kun laknigraj ŝpruc-makuloj. Almenaŭ tio estas mem-evidenta fakto, ke neniuj povas eĉ dubi. Tamen, kiam mi vidas la koloron, kiun mia Mastro uzis, ĝi ne estas flava, nek nigra, nek griza, nek bruna. Nek miksaĵo de tiuj koloroj. Ĝi estas nur tia koloro, pri kiu mi ne povas juĝi alie ol diri ke ĝi tamen estas ia speco de koloro. Kio mirigis min plie: la okuloj mankas! Pro tio tamen li estas ne tute kulpigebla tial, ke li desegnis min dormantan, sed ĉar eĉ la sidloko de mia okulparo ne estas indikita, oni ne povas juĝi ĉu ĝi estas Blinda Kato, aŭ Dormanta Kato. Mi en la koro sekrete konkludis: Kia li, tia tute ne taŭgas por Andreo del Salto! Sed samtempe nur pri lia entuziasmo mi ne povas ne admiri. Mi do bonvolus plu resti senmova, se mi povus, sed de antaŭ iom da momentoj mi sentas al mi urinemon. Jam nun tra la tuta korpo jukas la muskoloj nesubigeble. Tiom urĝas la afero ke eĉ momenton mi jam ne povas lasi. Pardonu — malgraŭvole, mi streĉis la antaŭ-piedojn antaŭen, etendante la kapon per la kolo laŭlonge kaj suben, kaj larĝe oscedis a—ŭ! Nu, jam en tia stato, mi ne bezonas plu esti senmova. Al mia Mastro mi jam fuŝis la projekton, mi do eliru urini malantaŭ la domo, kaj mi ekmarŝis per malrapidaj paŝoj. “Kanaĵlo!” — ektondris el la gastoĉambro la voĉo de mia Mastro, voĉo miksitita de kolero kaj malespero. Li kutimas, kiam ajn li insultas alian, krii per “Kanaĵlo”. Li tute ne scias aliel insulti, ol per tio; do lasu: tamen li nun estas tiel senkompata, ke li arogas min insulti per “Kanaĵlo” tute senpripense ke mi tiom pacience pozis por li ĝis la nuna momento. Kaj tamen mi ankoraŭ nun voluntus akcepti lian kaprican insulton indulgeme, nur se en la ordinaraj tagoj la cirkonstanco estus tia, ke li foj-foje montras al mi nur iomete pli bonvenan vizaĝon, kiam mi saltas sur lian ŝultron! Siavice li ĝenas sin por fari nenion ĝis nun, kio estas por mia utilo, kaj nun, kia malĝentilaĵo, ke se mi ekstaris por urini, li kanaĵl-nomas min! Homoj estas denature tro malhumilaj, fierante per siaj talentoj kaj kapabloj! Estaĵoj pli fortaj ol Homoj aperu por iom torturi ilin lecione, alie, ni ne povas vidi ĝis kia ekstremo kreskos ilia malhumilego!

La tioma kaprico, kiom mi ĵus rakontis, ankoraŭ tamen estas tolerebla. Sed ol ĝi, multoble pli ĉagreninda raporto pri skandalo de Homo iam eĉ povis veni al mi en la oreleon.

Post mia domo estas ĉirkaŭ dek *cuboj* da tekampo. Ne vasta, ĝi tamen estas beleta kaj sunplena loko. Kiam la infanoj tro bruas malhelpante al mi la komfortan tagdormon, aŭ kiam mi tro enuas pro malorda stomako, ĉiam mi iras

tien por refreŝigi min per plenpulma spirado. Unu belan aŭtunan tagon, ĉirkaŭ la dua horo, post kiam mi agrable dormis tagmanĝinte, mi portis miajn paŝojn en ĉi tiun tekampon, parte por muskolekzerca promenado. Mi paŝis flarante ĉirkaŭ radiko post radiko de la tearbetoj, ĝis mi atingis la cedrobarilon en la okcidenta parto. Tie mi trovis gigantan Katon, dormantan senkonscie sur velkintaj krizantemoj tresternitaj sur la tero. Mian alpaŝon li tute ne rimarkis, aŭ kvazaŭ li ne atentus, eĉ se li rimarkus. Kun muĝa ronkado li dormas kuŝante laŭ sia plena longo. Ĉu iu alia en la mondo povus dormi tiel aplombe, kiu ŝtelpaŝis en fremdan korton!? Mi en mia koro ne povis ne miri pro tia bravula egalanimeco. Pur-sange nigra Kato li estas. La suno, iom pasinta tagmezon, ĵetas diafanan lumradion sur lian lanon; el lia briletanta lanugo kvazaŭ ŝvebas flamnebulaj nimfoj, nevideblaj per la okuloj. Li posedas tiel grandiozan staturon, ke oni rajtus nomi lin Reĝo de Katoj. Certe, li mezuras duoble pli granda ol mi. Mi rekte staradis antaŭ li gapobservante pro admiro kaj scivolo, kiam la trankvila aŭtuna vento ekblovus skuetante la branĉojn de gingko-arbo, kiu elstaras alte super la cedrobarilo ĉe la alia flanko, kaj faligis du-tri foliojn en densejon de la velkintaj krizantemoj. Tiam Reĝo dismalfermis plen-larĝe la rondajn okulojn. Tiujn ĉi mi neniam povas forgesi. Ili brilis multe pli bele ol sukceso, kiun Homoj trezoras. Li restas senmova kiel statuo. Fokusante sur mian etan frunton la rektan lumbrilon el interne de ambaŭ pupiloj li demandis, “Kio vij estas ja?” Por Reĝo lia lingvo estas iom tro kruda, mi opiniis, sed ĉar en lia voĉo latentis la forto eĉ Hundon subiga, mi terursentis ne malpli ol iom. Kaj ĉar mi pensis, ke ne estos sen danĝero, se mi ne salutos unua, mi ekparolis, “Mi estas Kato. Mia nomo ankoraŭ mankas”, iom penaplbombe, ŝajnigante min sentima. Sed en tiu momento certe batis mia koro pli febre ol ordinare. “Kato? Diablo aŭdu, ke vij estas Kato!” li diris kun malestima tono kaj plu impertinentas, “Kie vij vegetas do?” “Mi loĝas en ĉi tiu domo de la instruisto.” “Kion mij divenis! Vij estas terure malgrasa, ĉu ne?” li reĝe bombastas. Juĝante el lia parolmaniero mi ne pensas, ke li veras de bona familio. Sed laŭ tio, ke li estas tiel grasega kaj korpulenta, ŝajnas ke li manĝas frandaĵon, ke li vivas en abunda lukso. “Vi — kiu vi estas?” mi devis demandi. “Mij estas Nigro de la rikiŝista domo!” li fieras. Al ĉiuj en la tuta ĉirkaŭaĵo la nomo de Nigro de la rikiŝista domo estas fam-konata kiel Katsovaĝulo. Merite al la rikiŝista Mastro, li ankaŭ nur estas forta, tamen seneduka, tiel ke neniuj societemas kun li. Li estas la celo de nia respektive-ovitismo alianco. Tial ĉe la nura aŭdo de lia nomo, mi sentis iom tremi la teron sub miaj piedoj, sed samtempe iom eksentis malestimon kontraŭ li. Mi dó, por ekzameni kiom senklara li estas, provis per jenaj demandoj kaj respondoj.

“Mi scivolas, kiu estas pli grandioza, ĉu rikiŝisto, aŭ instruisto?”

“Senbezono diri, ke rikiŝisto estas plij granda! Vijdu la mastron de vija hejmo, li estas nur skeleto en haŭto!”

“Vi ŝajnas tiel forta por meriti esti Kato de la rikiŝisto. Ĉe la rikiŝista domo vi ĉiam povas manĝi frandaĵon, ĉu ne?”

“Mij? Al mij ĉiam manĝo abundas, en kiun ajn landon mij iras. Ĉesu ĉirkaŭiri en la tekampo. Venu trenante vin post mi kien mij iras. Kaj vij tiom grasiĝos antaŭ forpaso de monato, ke onij prenos vin tute por aliulo!”

"Ne, alian fojon mi iam petos tiel. Nu, tamen, la instruisto loĝas en pli granda domo, ol la rikiŝisto, ĉu ne vere?"

"Absurd!" Kiel ajn granda estu la domo, ĝij ne povas ŝtopij la stomakon!"

Ŝajne, mi ege incitis al li la galon. Vibriginte la orelojn, similajn en formo al bambupecoj oblikve dishakitaj, li foriris. De tiam komenciĝis mia amikeco kun Nigro de la rikiŝista domo.

Post tiu okazaĵo mi ofte renkontiĝas kun Nigro. Ĉe ĉiu renkontiĝo li bombastas kiel indas al sia rikiŝista Mastro. Verdire, la skandalon, pri kiu mi antaŭe diris, ke ĝi venis al mi en la orelon, mi informiĝis de tiu ĉi Nigro.

Unu tagon, mi kaj Nigro kuŝante sur la varma tekampo kiel kutime interbabilis pri diversajoj. Kiel ĉiam Nigro litiis al mi la gurditan fanfaraĵon kvazaŭ novaĵon kaj poste al mi demandis jene.

"Kiom da ratoj vi jam kaptis ĝis hodiaŭ?" Nu, mi scias, ke mia intelekto estas multe pli evoluinta ol Nigro, sed se temas pri fizika forto kaj kuraĝo mi neniel kompareblas kun li, tion mi jam delonge agnoskis. Malgraŭ tio, ĉe la nuna demando, mi tamen ne tute povis esti senembarasa, mi konfesas. Vero estas vero; mi ne povas mensogi.

"Verdire, kapti mi ĉiam tre volis, sed ankoraŭ ne povis", mi respondis.

Ekridegis Nigro, vibrigante la longajn lipharojn etenditajn de ĉirkaŭ la nazpinto. Denature, al Nigro, kiu tiel bombastas, en la kapo io mankas. Nur se mi aŭskultas lian fanfaraĵon, gorĝknarante grrr por falsadmiro, tiom longe li estas facile traktebla. Tiun ĉi takton mi povis proprigi al mi tuj ĉe mia konatiĝo kun li, kaj tial ankaŭ nun mi pensis, ke malsaĝe estos igi mian pozicion pli malavantaĝa per mia propra mempravigo; mi do decidis, ke la plej saĝa politiko estas fliki mian situacion lasante lin paroli pri sia fierindaĵo.

"Vi — via aĝo estas tiom granda, ke vi jam kaptis multe, ĉu ne?" mi ĝentile loginstigis lin al parolo. Atendite, li sturmis al mi kvazaŭ en fendan lokon de barilo! "Hm! Ne multe, tamen almenaŭ tri-kvar dek mij jam kaptis laŭ la modesta kalkulo!" fiere sonis lia respondo. "Ratoj venu cent-aŭ eĉ ducent-ope kaj mij eĉ sola ĉiam pretas disponi ilin", li daŭrigis, "Tamen, la mustelo estas aĉulo, kiu ne estas tenebla sub mia mano! Mij iam atakis ĝin kaj estis terure sapumita en la nazon!" "Ho, ĉu vere!" mi agordiĝas. "Tio okazis dum la sezona dom-purigado de la lasta jaro", diris Nigro palpebrumante je la larĝaj okuloj, "Mia Mastro portante sakon da kalko eniris sub plankon, kiam, imagu al vi, ke surprizita mustelo elsaltis!" "Hum?" mi falsmiras. "Kio estas mustelo? Ĝij estas nenio grava, io plij granda ol rato! Fiulon! — mij celis-ĉasis, kaj imagu al vi, ke mij enpelis ĝin en akvofluejon!" "Hura! Bonege!" mi falsaklamas. "Kaj tamen, kiam mij ĵus pretigis min ĵeti, ĝij pafis kontraŭ mi la fin-furzon! Kia fetoro, mortigaodoro!! De tiam eĉ la nura vido de mustelo estas al mij vomiga!" Li levis antaŭpiedon kaj per ĝi du-tri fojojn frotadis ĉirkaŭ la nazpinto kiel se li ankoraŭ nun faras la haladzon de la pasinta jaro. Mi iom kompatis lin. Kaj pensante, ke mi iom prosperigu lian parolon, mi daŭrigis, "Sed ĉiun raton, kiun vi fiksas per viaj okuloj vi nepre kaptas unu fojon por ĉiam, ĉu? Vi estas la majstro en kaptado de ratoj kaj ĉiam povas manĝi nur ratojn, ke vi estas tiel grasa kaj brila, ĉu?" Sed tiu ĉi demando, intencita por flati al li, mirinde reportis la malan rezulton. Li

kun decida tono diris post granda ĝemspiro, "Nur iom pensu, kaj ve, ĉio estas vanta! Kiom ajn mij perlaboru kaptante ratojn — nu, Homoj estas la plej grandaj senhontuloj en la mondo! Iliaj arogas forpreni de nij ĉiun raton, kiun nij kaptas, kaj alportas ĝin al polic-gardejo, kie oni donas 5 senojn³ po rato, nescie kiu ĝin kaptis! Jen mia Mastro, dank' al mij li jam gajnaĉis ĉirkaŭ 1 jenon³ kaj 50 senojn kaj malgraŭ tio li regalis al mij per nenio speciala, kio manĝeblas apetite! He, mij diru, Homoj estas ĝentilmaskaj rabistoj!" Kvankam seneduka, Nigro tamen scipovas almenaŭ tiom rezoni, ke li koleregas hirtiginte al si la dorsajn harojn. Alarmita de timosento, mi do parol-evite flikis mian situacion kaj foriris hejmen. De tiam mi decidiĝis, ke mi neniam kaptos raton. Kaj ankaŭ neniam mi fariĝis subulo de Nigro por iri kun li serĉante frandaĵon anstataŭ rato. Mi preferas dormi komforte, ol manĝi frandaĵon. Ŝajnas, ke ĉe instruisto eĉ Kato fariĝas tia karaktere, kia instruisto. Se mi ne atentis, mi ankaŭ fariĝos dispepsia baldaŭ, mi timas.

Nu parolante pri la instruisto, mia Mastro nur en la lasta tempo eble konvinkiĝis, ke li ne povas havi esperon pri si en la pentroarto, ĉar en la taglibro, je la dato 1-a de Dec., li skribas la jenon:

"Renkontiĝis la unuan fojon kun sinjoro X X ĉe la hodiaŭa kunsido. Oni diras, ke li estas multe diboĉinta, kaj inde, havas la trajton de eleganta spertulo. Tial ke viron kun tia eco virinoj nature ŝatas, pli adekvatus diri, ke li diboĉis malgraŭ-vole, ol diri, ke li diboĉis mem-vole. Mi aŭdis, ke lia edzino estis geĵso. Envidinde. Kiuj klaĉas pri diboĉulo, estas plejmulte tiaj, kiuj kvalite ne kapablas mem diboĉi. Inter kiuj memaprobas sin kiel diboĉulojn ankaŭ povas sin trovi multaj, kiuj kvalite ne kapablas mem diboĉi. Ĉi tiuj diboĉas ja mem-vole, kaj ne malgraŭ-vole. Tiaj neniam sukcesos elgradiĝi kun la diplomo de spertulo, ĝuste samkiel en la okazo de mia pentrado. Kaj malgraŭ tio tamen, la mem-aprobata koncarnato — en si kredas, ke li estas spertulo, kaj eĉ momenton ne skrupulas. Se eleganta spertulo estas ĉiu, kiu drinkas sakeon ĉe drinkdomo kaj frekventas geĵso-domon, nu, mi pentras, do mi ankaŭ estas ne-malgranda pentristo. Sed tia pentraĵo, kiam mi ellaboras, estus pli bonfara, se ĝi entute ne estus pentrita jam de la komenco; ĝuste same tiel, elmontara malelegantulo estus multe pli bona ol azena eleganta spertulo."

Kun la argumento pri spertulo mi facile ne povas konsenti. Precipe la stulta opinio, nepardonebla por instruisto eĉ meti sur la lipojn, estas ke li envias geĵŝan edzinon. Aliparte, tamen, lia juĝkapablo pri sia propra pentraĵo estas trafe solida. Malgraŭ ke mia Mastro havas tian sagacon por memtaksado, li ankoraŭ estas neniel libera de memfiero. Trans la du-taga intervalo, la 4-an de Dec. en la taglibro li skribas:

"Hieraŭ nokte mi sonĝis. Pentrante akvarelon mi meditis, ke mi neniel povos ĝin elfari kiel ion indan, mi lasas ĝin; iu ĝin fikisis en belegan kadron, pendigis super la supra-sojlon de mia ĉambro. Nu rigardante en la kadron mi sentas min subite grandioza. Tre ĝojas. Tio estas bonega! admirante ĝin mi sola pasigas tutan tagon. — Dume tagiĝis, mi ekvekigis, kaj kun la matena suno fariĝis tiel klara la fakto, ke mi ĉiam ankoraŭ estas mallerta!"

Ŝajnas, ke la Mastro eĉ en sonĝo vagas portaate la ombreon de akvarelo. Sub

tia ŝarĝo, li neniel povos fariĝi akvarela artisto, rek spertulo, pri kia la moŝto mem tezis.

La sekvan tagon post la nokto kiam la Mastro sonĝis pri akvarelo, lin vizitis post longa tempo la estetikulo kun la orkadraj okulvitroj. Post sidigo li tuj ekparolis unua, demandante antaŭ ĉio, "Kiel iras via pentrado?" Mia Mastro, mienante ke nenio nova okazis, respondas, "Laŭ via konsilo, mi strebas skizi laŭ naturo. Kaj dank' al tio, mi nun povas bone vidi la delikatajn konturojn de objekto kaj subtilajn kolor-nuancojn, kiujn mi antaŭe ne rimarkis. La Eŭropa pentroarto, kiel ŝajnas al mi, dankas la nunan evoluon al tio, ke oni akcentadis laŭ-naturan skizon jam de la malnova tempo. Granda estas Andreo del Salto!" tiel laŭdante Andreon del Salto denove, li eĉ rukte ne elbuŝigas kion li skribis en la taglibro. "Por malkaŝi la veron, amiko," komencis la estetikulo ridante kaj gratante sur sia kapo, "Kion mi diris, tio estas blago?" "Pri kio nu temas?" mia Mastro ankoraŭ ne rimarkas ke lia amiko lin petolis. "Pri nenio alia, ol Andreo del Salto, kiun vi tiel laŭdas! La tuto estas fabelaĵo, kiun mi elknedis. Mi tute ne pensis, ke vi kredemus ĝin tiel serioze, ha, ha, ha, ha..." ĝojas grande la amiko. Aŭskultante ilian dialogon, ĉe la verando mi ne povis ne konjekti, kio estas registrota en la hodiaŭa taglibro de mia Mastro. La estetikulo estas viro, kiu trovas unikan plezuron en blago trumpetante tian sensencaĵon. Ankaŭ nun, li tute ne atentis, kiam vibron tio povis doni sur la temperamentan kordon de mia Mastro, kaj plu babilis en fiero la sekvantan aferon. "He, amuze estas ĝui komikan belsenton elvokita, se oni foje prenas min kredeme, kiam mi diras ŝercon! Antaŭ iom da tempo mi ŝerce rakontis al studento, ke Nicholas Nicholbey sugestis al Gibbon ne skribi en la Franca la grandan verkon de lia vivo, "La Franca Revolucio," kaj sukcesis eldonigi ĝin en la Angla. La studento estis forte bonmemora, ke ĉe paroladkunveno de la Japana Literatura Societo li ripetis la samon, kiel mi parolis. Komike! En tiu okazo estis ĉirkaŭ cent aŭskultantoj kaj ĉiuj aŭskultis fervore. Ankoraŭ alian amuzan rakonton mi havas. Antaŭ nelonge, kiam en iu verkista kunveno oni diskutis pri *Theophano*, historia romano de Harrison, mi miavice diris, ke tio estas la plej modela el ĉiuj historiaj romanoj, aldonante, ke la priskribo pri la morto de la heroino estas harhiritige terura. Tiam la sinjoro, kiu sidis kontraŭ mi trans la tablo kaj kiu neniam scias diri "Mi ne scias", diris, "Jes, jes, tiu priskribo estas majstra!" El tio mi eksciis, ke tiu ĉi viro ankoraŭ ne legis ĉi tiun romanon same kiel mi." Mia Majstro nervoz-dispepsia larĝigis la rondajn okulojn por demandi, "Sed kion vi farus pri via malveraĵo, se via parolo okaze estus leginta la libron?" Li diras kvazaŭ ke oni rajtas trompi, escepte la embarasajn okazojn de senmaskiĝo! Tamen aplomba restas la estetikulo. "Nenion en tia okazo, krom diri, ke mi erare prenis alian libron por tio kaj simile plu," li ekridas bleke. Malgraŭ ke ĉi tiu estetikulo portas la orkadrajn okulvitrojn, li havas pli-malpli similan temperamenton kiel Nigro de la rikiŝista domo. Mia Mastro silente elpafas fumringojn de *Hinode*-cigaredo, kvazaŭ mieni, ke li ne havas tian kuraĝon. La estetikulo, kun la mieno kvazaŭ por rebati, ke ĝuste estas pro la manko de tia kuraĝo, ke li ne taŭgas por la pentroarto, daŭrigas, "For la ŝercojn — nu, la pentrado ja estas malfacila! Leonardo da Vinci admonis, oni diras, al siaj disĉiploj, ke ili skizu mur-makulojn

de katedralo. Kiam mi eniris la necesejon malantaŭ mia domo, kaj atente observis la murojn trasorbitajn de pluvo, mi ektrovis sur ili tre pitoreskajn desegnaĵojn natur-faritajn. Vi ankaŭ skizu ilin kaj vi certe faros interesajn desegnaĵojn." "Ĉu denove vi volas mistifiki?" "Ne, nur tio ĉi estas ververa! Tio estas tre sugesto-plena opinio, ĉu ne? Kion ĝuste Leonardo da Vinci povas diri, ĉu ne vere?" "Jes, sugestoplena ĝi certe estas," mia Mastro duon-kapitulacas. Sed kiom mi scias, li deposte neniam ion skizis ankoraŭ en la necesejo!

Nigro de la rikiŝista domo iam poste fariĝis lamulo. Liaj haroj pli kaj pli perdas la brilan koloron kaj defalas. Liaj okuloj, kiujn mi iam taksis pli belaj ol la sukceso, nun plenas de muko. Kio altiris mian atenton aparte, tio estas perdiĝo de lia kuraĝo kaj malboniĝo de lia korpa strukturo. Kiam por la lasta fojo mi renkontis lin en la tekampo kaj demandis, kiel li fartas, li respondis, "Ve, ĝismedole tanis al mi la peza stango de fiŝvendisto samkiel la fin-furzo de mustelo!"

La ruĝiĝintaj acerfolioj, kiuj puncis la *akamacu*-pinojn^④ per du-tri ŝtupoj, forfalis kiel prasonĝo, la petaloj de kamelioj, ruĝaj kaj blankaj, kiuj falis unu post unu apud la ĝardeno manlavujo, jam elĉerpiĝis. Kiam sur la verando, rigardanta al la sudo, pli kaj pli rapide kliniĝas la sunaj baskoj, kaj preskaŭ neniu tago forpasas sen frosta vento, de tiam malkreskis ankaŭ la horoj de mia tagdormo, al mi ŝajnas.

Mia Mastro iras al la lernejo ĉiutage. Reveninte li enfermas sin en la stud-ĉambron. Kiam iu venas al li vizite, li diradas, ke la sorto de instruisto estas abomena. Li preskaŭ neniam plu pentras akvarelon. Li jam ne prenas Takadiastase dirante, ke ĝi ne efikas. Admire, la infanoj iras al la infanlernejo seninterrompe. Reveninte, ili kantas, pilko-ludas, foje pendigas min per la vosto.

Tial ke mi ne prenas frandaĵon, mi ne grasiĝas. Ĝenerale en bona sano kaj aparte sen lamiĝo, mi iel pasigas tagon post tago. La raton mi neniam kaptas. La servinjon mi ĉiam ankoraŭ malŝategas. Mia nomo ankoraŭ ne estas donita. Deziro ne konas la limojn, tial en ĉi tiu domo de la instruisto mi volas esti kontenta vivi ĝis la vivofino kiel sennoma Kato. (Jan. 1905)

El-japanigis: T. Mikami

NOTOJ:

- ① La (gorĝ-voĉa) recitado de rakonto, epopeo k. a., origino en akompano al la NO-drama danco.
- ② Unu cubo = 3.30579 centiaroj.
- ③ Seno estas la japana groŝo; 100 senoj faras unu jenon.
- ④ Pino, kies arboŝela koloro estas ruĝe-bruna.

(La supre-tradukita estas la unua ĉapitro el "Mi estas Kato". Kun ĝi la aŭtoro debutis kiel novelisto kaj lia "Kato" tuj fariĝis tiel populara, ke li devis daŭrigi ĝin per sekvontaj ĉapitroj unu post unu — ĝis fariĝis entute dek unu ĉapitroj. — Noto de la Tradukinto.)

Indekso pri OOMOTO 1955

Titolpaĝaj:

Kiamaniere forigi la maltrankvilon?...	1
Religio kaj Mondpaco	33
Misio de Religiistoj	65
Fondo de Monda Konsilantaro por Inter-Religia Kunlaborado	97
Karito kaj Amo	129
Valoro de la Paco	161

Religiaj kaj Filozofiaj:

Memornoto de <i>Hidemaru Deguchi</i> 2, 66, 162	
Ĉu ni estas kreitaj por la komuna vivo?	11
Universala Konferenco de Religiistoj 42, 104	
Unu lingvo kaj unuspeca parolo	131

Pri-Esperantaj:

Helpu la propagandan kampanjon en Francujo	14
Esperanto kaj la Olimpikaj Ludoj ...	15
Esperanto kaj Libervola Civila Helpservo Internacia	64
Oficialaj poŝtmarkoj kun la bildo de Zamenhof estu eldonitaj en multaj landoj!	70
Alvoko de Pisa Esp-Grupo	77
La 42-a Japana Esp-Kongreso	133
Seminario Zamenhof	138
Vojaĝo de Angla S-anino D. M. Worcester en Japanujo	169

Diversaĵaj:

Porpacaj Movadoj	
Tutlanda Pacdemonstracia Agado en Hungarlando	18
Mondaniĝa Deklaro de Macue Urbo	19
Monda Kongreso por Mondfederacio	50
Festo por la 39-jara Jubileo de UHA	78
Unua Kunsido de Reprezentantoj de Japanaj Mondanigitaj Urboj ...	79
Mondaniĝa Deklaro de Hirata Urbo	79

Mondaniĝo de Urboj kreskas en Japanujo	146
Aktiveco en Orienta Eŭropo	146
Dua Kunsido de Reprezentantoj de Japanaj Mondanigitaj Urboj	172
Sep Japanaj Gvidantoj Kune Sendis Apelacion Al UNO	174
Konferenco por Akceli la Rezignon pri Milito	174
Alvoko al la tuta mondo	4
La Rondo de Homaranoj	
El Azia-Afrika Konferenco	35
Novzelando, la Lando kaj Popolo ...	46
Paco antaŭ ĉio el la ĉielarka disko...	68
Profilo de Hindujo	80
Monda Kongreso por Malpermeso de Nukleaj Armiloj	119
La Unuaj Eltrovintoj de Nov-Zelando	140
La Kreskanta Volvilo de Amikeco ...	143
Ne ripetu Hiroŝimaon	30
Homo superhomo malhomo	51
Azio, la plej malriĉa	53
U.N.E.S.C.O. — NOVAĴOJ	178

Literaturaĵoj kaj Poemoj:

Legendo	16
El Man'jo	17
La Gardostaranto	52
La Blua Biciklo	82
Aŭroro	121
Ho, l' atombombon ne lasu plu ni!...	128
Mi estas Kato	182

Serioj:

Japana kulturo	5, 38, 72, 98, 165
Literatura Rubriko 22, 54, 84, 122, 148, 176	
Parolas la Legantaro 20, 58, 90, 151, 179	
El Notlibro Esperantista 25, 61, 92, 124, 154	
Popola Arto pri Pupoj ... 86, 95, 118, 123, 145, 150, 175, 180	
Poŝtmarka Informo en 1955 31, 60, 89, 180	

